

1974 marto
67-a jaro
n-ro 819 (3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Finna eksperimento?

tri plenajn paĝojn da recenzoj en ĉi tiu numero, kio okazis ankaŭ kun la unuaj du numeroj de ĉi tiu jaro. Nu, feliĉe, ke en kultura movado, kia estas la nia, la eldona aktiveco viglas, kio siavice postulas ankaŭ nian kunlaboron en formo de senpartia prezento de la novaĵoj sur la libro-merkato. Tamen, en ĉi tiu numero vi trovos almenaŭ unu negativan recenzon. Eble eĉ estas malbone, ke aperas senvaloraj libroj, sed aliflanke estas tre valore kaj salutinde, ke komencis aperadi ankaŭ nefavoraj recenzoj. Tion la libro-merkato jam delonge bezonis.

Cetere, apartan atenton en ĉi tiu numero ni dediĉas denove al la ĵus pasinta Semajno de Internacia Amikeco, klopodante mezuri ekstermovadajn eĥojn de la iniciato, kiu en la Movado mem ankoraŭ ne havas la deziratajn dimensiojn de populareco kaj apogo.

Enhavo

- 41 Novaj eblecoj por efika agado: Lingvo kaj rasismo (I. Lapenna)
- 42 La pezo de argumento
- 43 Instruistoj en Finnlando volas eksperimentan instruadon: Propono al la Ministerio (H. Laine)
Militdeklaro kontraŭ majuskloj
- 44 Problemoj de la interpretista profesio: Maloftas la necesa kombino de kvalitoj
- 46 ILEI-konferenco: Modelaj eksperimentoj
- 47 Kelkaj precizigoj pri la UK en Hamburgo: Respondeca komuna tasko (I. Lapenna)
- 48 Semajno de Internacia Amikeco: Formo kiu serĉas ĝustan enhavon (sm)
- 49 La Internacia Ekzameno
- 50 Enciklopedio: Marjorie Boulton (H. Tonkin)
- 51 Leterkesto (A. Šalamon, R.E. Wood, S. Möllestad, Šibajama)
- 52 Recenzoj ("Je parole esperanto", "Morso-Klubo", "Terminaro por bibliaj studoj", "Patroj kaj filoj", "Arbo de la sciado", "La krimo de l'milito", "Junulejo; La buĉejo")
- 55 Novaĵoj pri la 59a Universala Kongreso en Hamburgo
- 56 TEJO-paĝo: 40 gastigantoj — Defio por demostenoj
- 57 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 58 Oficiala informilo — Membro-statistiko 1973
- 59 Esperanto en radio
Nekrologoj (E. Sonnenfeld, C. Timmerman, P. Boulogne, G. Podlinski)
- 60 Anoncetoj

La kovrilo

Dum kelkaj lastaj jaroj, ILEI per sia agado minacas transpreni la flatan titolon de la plej aktiva faka asocio, kiu antaŭe verŝajne apartenis al la fervojistoj. La batal-fronto de ILEI ĉiutage vastiĝas. Post energiaj paŝoj kaj rimarkindaj sukcesoj en la instruado de la Internacia Lingvo en Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio, Aŭstrujo, FR Germanujo, Brazilo, Japanujo, Usono, Nov-Zelando kaj pluraj aliaj landoj, la ILEI-sekcio de Finnlando faris novajn klopodojn ĉe la Eduka Ministerio en sia lando. Nia foto montras momenton dum la transdono de aparta propono al tiu Ministerio. (V. detalojn sur la paĝo 43).

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Ĉefredaktoro: V. Sadler.

Inkluzivas la organon de TEJO "La Juna Vivo" (TEJO-paĝo).

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,— gld. (kun membreco kaj Jarlibro: 40,— gld.). Unuopa ekzemplero: 2,50 gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Mezafriko, Norda kaj Meza Ameriko 8,25; Mezoriento, Nordafriko 5,50 gld.

Anonctarifo: 1 p. 375 gld., 1/2 p. 200 gld., 1/4 p. 110 gld., 1/8 p. 65 gld., 1/16 p. 40 gld. Ripet-rabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-Singel 93, Rotterdam-3002, Nederlando; konto n-ro 25.52.89.804.

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA)
Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, administrado kaj juraj aferoj: Prof. I. Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, Middx, HA9 8TF, Britujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri turismo kaj aŭtomobilismo: E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri scienco kaj tekniko: Prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, delegita reto, junularo kaj diskonigo de la agado de UEA: G. Becker, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 2, FR Germanujo.

Estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj kaj pri organiza plifortigo: D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26, FR Germanujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj: J. Uśpieński, PL-00-975 Warszawa 12, Poŝtkesto 100, Pollando.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp (Gld.), Nederlando.



NOVAJ EBLECOJ POR EFIKA AGADO

Lingvo kaj rasismo

JAM FINE DE 1972 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis organizi vastan programon sub la ĝenerala titolo Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. Unesko partoprenas en tiu agado. Same la Neregistaraj Organizaĵoj (NROj) en konsultaj rilatoj kun Unesko. Tiucele jam okazis diversaj seminarioj, rondtablaj konferencoj kaj aliformaj diskutoj, inter kiuj elstaras la Simpozio pri Rasismo fine de marto 1973. UEA aktive partoprenis en la preparado de la Simpozio, unue pere de la subskribinto, kiel ŝarĝito pri eksteraj rilatoj, dum pluraj renkontiĝoj de NROj en Londono, kaj poste, dum la Simpozio mem, pere de s-ro Jean Thierry, la multjara sindona reprezentanto de UEA ĉe la Sekretariato mem en Parizo.

Dum tiuj multnombraj kontaktoj UEA daŭre atentigadis pri la lingva diskriminacio sur internacia kaj landa niveloj. La enmeto de la lingva demando en la abundan dokumentaron pri rasismo kaj rasa diskriminacio ŝuldiĝas almenaŭ parte al intervenoj de UEA.

Nun kaj UN kaj Unesko preparas la detalojn de la agadprogramo. En sia kvalito de organizaĵo en konsultaj rilatoj B, UEA estis invitita doni sugestojn kaj informi pri la entreprenotaj agadoj sur tiu kampo en la sekvontaj jaroj.

En ampleksa letero, adresita al la Departamento pri Homaj Rajtoj de UN kaj al la Departamento pri Sociaj Sciencoj de Unesko, UEA prezentis sian starpunkton. En la letero estas, interalie, dirite, ke foresto de komunikado inter rasaj kaj/ aŭ naciaj komunaj kaj grupoj estas tutcerte unu el la fundamentaj obstakloj, malhelpantaj reciprokan interkompreniĝon kaj, eĉ pli, socian kaj kulturen integriĝon. Tio koncernas la interrasajn rilatojn kaj en mondaj dimensioj kaj interne de unuopaj landoj. Nek internaciaj agadoj celantaj pli bonan internacian kompreniĝon, nek progresema hejma leĝaro favoranta socian kaj kulturen integriĝon povas sukcesi, se ne ekzistas ebleco por rekta komunikado inter individuoj apartenantaj al diversaj lingvaj komunaj. Por povi sukcese kontraŭbatali

rasismon, estas necese ne sole agadi kontraŭ ĝiajn eksterajn manifestigojn per la jam establitaj metodoj, sed ankaŭ — fakte unuavice — forigi ĝiajn radikojn. La lingva problemo estas sendube unu el ili. Ĉar tiu demando estis preskaŭ komplete neglektata en la pasinteco, UEA proponis, ke UN kaj Unesko dediĉu al ĝi la plej seriozan konsideron en la estontaj studoj ligitaj al diversaj aspektoj de rasismo.

La dokumento de UEA aparte atentigas, ke, konforme al Art.1 de la Internacia Konvencio pri Elimino de Ĉiuj Formoj de Rasa Diskriminacio (1965), rasa diskriminacio signifas kiun ajn distingon, ekskludon, limigon aŭ preferon, bazitan ne nur sur raso, koloro, religio, origino aŭ nacia aŭ etna aparteno, sed ankaŭ sur lingvo.

En la fino UEA emfazas, ke Art.4 de ĝia Statuto entenas principan deklaron, ke la respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por la laboro de la Asocio, kaj ke tiu klaŭzo estis enmetita en la Statuton longe antaŭ la akcepto de la Universala Deklaracio en 1948.

UEA sendube intensigos sian agadon por doni helpon al la realigo de la celoj de la Jardeko. Konkiza agadprogramo kun emfazo je la lingva aspekto estos pri-traktita dum la aprila kunsido de la Estraro kaj, post eventualaj amendoj, publikigita en *Esperanto* por ĝenerala diskuto; fine, ĝi estos prezentita al la Komitato en Hamburgo por decido. Do, oni sekvos la saman vojon, kiu en la pasinteco donis tiom da utilaj fruktoj por la Internacia Lingvo kaj por UEA. La antaŭvidita agado donos multnombrajn eblecojn por atentigi kaj la internaciajn instancojn, kaj la landajn aŭtoritatojn, kaj la vastan publikon pri tiu grava aspekto de la lingva problemo.

En ligo kun tio estas bone informi la membraron, ke nun denove malfermiĝas la pordo por efika kunlaborado de niaj landaj asocioj kun la t.n. Naciaj Unesko-Komisionoj. Pri tio jam estas sendita ampleksa cirkulero kun multaj detaloj al ĉiuj LA kaj komitatanoj resp. observantoj de UEA.

Ivo Lapenna

La pezo de argumento

SPECIALE ekde kiam oni startis kun la bultenoj de “Eltondaĵa servo”, en kiuj oni kopias la plej interesajn artikolojn, kiuj pri la Internacia Lingvo aperas en nacilingvaj gazetoj (50 paĝoj jare, kontraŭ abono de 20 gld.), en la Centran Oficejon venas tuta malgranda



Rekonsciiĝo pri la propraj valoroj: La mesaĝo de la surskriboj de Moenjodaro, apartenantaj al la civilizo de Indus-Valo, ankoraŭ ne estas deĉifrita, malgraŭ sia aĝo de 4 500 jaroj.

inundo da gazetaj eltondaĵoj. Kvankam oni tutcerte kun danko akceptas ĉiujn unuopajn klopodojn provizi la Oficejon per tia materialo, unu el tiaspecaj sendaĵoj, ĵus veninta, aparte ĝojigis nin. Temas pri granda (pli ol 1 300 vortoj) kaj favora artikolo en unu el la plej gravaj ĵurnaloj de Pakistano, la anglalingva *The Pakistan Times*. La artikolon sendis al ni mem ĝia aŭtoro, d-ro Safdar Khan, lekciisto en la geologia fakto de la Universitato en Peshawar. Tio ĉi sendube estas la plej ampleksa (eble eĉ la unua tiaspeca) artikolo kiu iam aperis en pakistana gazeto.

Tamen, la kialon, ke ni dediĉas sufiĉan spacon al tiu artikolo, oni devus serĉi en la artikolo mem. Ĝi nome estas unu el tiuj maloftaj publikaj elpaŝoj de la aktivuloj de nia Movado, kiu ne manipulas eterne per jes belaj kaj noblaj celoj kaj idealoj, sed uzas modernajn kaj trafajn argumentojn, kiuj per si mem vekas atenton. La artikolo de d-ro Khan finiĝas per jena frazo: “Nacioj, kiuj spertis la ŝarĝon de kolonia jugo, povas rompi la sorĉon de la metropola kulturo — sole per la enkonduko de universala kulturo, Esperanto.” Nu, jes bombaste kaj patose, sed ion devus signifi ankaŭ la fakto, ke oni en ekskolonioj akceptas publikigi kaj legi tiajn ĉi pensojn, kiuj estas multe pli rekta atako kontraŭ lingva imperiismo, ol tiuj similaj, kiuj venas el landoj neniam spertintaj lingvan imperiismon, sed kontraŭe — praktikintaj aŭ praktikantaj ĝin.

Estante neŭtrala interhoma komunikilo kaj ne alportante novan premon por la naciaj lingvoj kaj kulturoj, la Internacia Lingvo devas ligi siajn ŝancojn al la grado de memkonsciiĝo de tiuj lingvoj kaj kulturoj.

Propono al la Ministerio

ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO intensigas sian kampanjon por oficiala subteno al la Internacia Lingvo. Eta, sed la plej bone videbla parto de tiu laboro estas la vizitoj ĉe la kompetentaj ŝtataj instancoj. En novembro, delegacio de EAF estis akceptita de la prezidanto de Finnlando (v. en nia revuo, dec. 1973, p. 211), en januaro oni sin turnis al la Eduka Ministerio.

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI), la instruista sekcio de EAF, transdonis al la Eduka Ministerio detale argumentitan proponon pri eksperimenta instruado de la Internacia Lingvo laŭ la konata kvinlanda modelo. La propono, krome, tuŝis la organizon de kursoj al instruistoj, helpoj por internacia kunlaboro kaj la starigon de oficiala komisiono por esplori la lingvajn problemojn.

Estas notinde, ke Finnlando jam en 1958-63 havis eksperimentan instruadon de Esperanto, gvidatan de rektoro Joel Vilkki. La oficialaj raportoj pri tiu eksperimento, kiu science studis la pedagogian valoron de la Internacia Lingvo, dum la postaj jaroj kaŝiĝis en la arkivoj de la Lerneja Administracio. La propono de ELFI atentigis la ministerion ankaŭ pri ĉi tiuj enlandaj spertoj.

La delegitojn de ELFI akceptis, la 23an de januaro 1974, s-ro Jaakko Numminen, ŝtatsekretario de la

Eduka Ministerio; li anstataŭis la Ministrin dum ties foresto. La proponon prezentis al li la instruistoj s-ino Terttu Tyynelä (prez. de ELFI), s-ro Pentti Järvinen (sekr. de ELFI) kaj Pekka Virtanen (prez. de EAF).

Harri Laine



Premo de la faktoj pri la pedagogia valoro de la Internacia Lingvo: Dum la propon-transdono en la Eduka Ministerio de Finnlando (de maldekstre) s-ino Terttu Tyynelä, prezidanto de ELFI, s-ro Pentti Järvinen, sekretario de ELFI, la ŝtatsekretario J. Numminen kaj s-ro Pekka Virtanen, prezidanto de EAF.

NOVA GERMANA ORTOGRAFIO?

Militdeklaro kontraŭ majuskloj

LA ESTRO DE LA FAKO pri germana lingvo ĉe la Universitato de Vieno, prof. d-ro Herbert Seidler, anoncis, ke eble fine de 1974 okazos konferenco de la registaroj de Aŭstrujo, Germana Demokratia Respubliko, Federacia Respubliko Germanujo kaj Svislando, en Vieno, por diskuti novan ortografion por la germana lingvo.

La ĉefaj diskutpunktoj verŝajne estos la forigo de la majuskla unua litero de ĉiuj substantivoj, la abolo de la litero **ß** kaj ĝia anstataŭigo per "ss" kaj simpligo de la reguloj rilataj al interpunkcio, aparte tiu regulo, kiu nun postulas la aŭtomatan enmeton de komo por disigi propoziciojn.

La aŭstra Ministro pri edukado kaj la artoj, d-ro Fred Sinowatz, atentigis, ke tiu reformo devus alproksimigi la parolan kaj skriban lingvon kaj povus esti realigita nur post unuanima voĉdono fare de ĉiuj kvar ĉefaj germanlingvaj landoj.

Obstakloj al unueco ĉefe ŝajnas esti restaĵoj de malvarmmilitaj tensioj inter GDR kaj FRG kaj la manko de respondeca federacia kulturpolitika instanco en la necentrigitaj, kvarlingva lando Svislando. Krome, oni notis (en konservemaj rondoj en FRG) kritikojn kontraŭ lingvoplanado kiel socia planado, provoj demokratiigi la socion pere de simpligo de la skriba kaj parola lingvo. Instruistoj de la germana lingvo en eksterlando krome atentigis, ke la majuskligo de germanaj substantivoj fakte faciligas la lernadon de la lingvo kaj aparte la legadon de tekstoj.

Maloftas la necesa kombino de kvalitoj

Citaĵo en la fino de ĉi tiu artikolo lamentas, ke la entuziasmo pri la lernado de fremdaj lingvoj spertas gravan krizon. La vero tamen estas, ke oni en la nuna tempo elspezas nekompareble pli da mono kaj energio por la lingvo-lernado, ol iam ajn antaŭe. Se la rezultoj estas katastrofaj, ili tamen ne fontas el kia ajn manko de entuziasmo, nek el "lingva naciismo", kiu cetere eĉ tute ne ekzistas. Ekzistas sole la lingva imperiismo kaj la absurdaĵoj, kiujn ĝi naskas. Plian lumon al la lingva kaoso en la hodiaŭa mondo klopodas ĵeti ankaŭ ĉi tiu artikolo, kiu esploras la staton sur la merkato de interpretistoj.

SAMTEMPA INTERPRETADO estas inventaĵo de la lastaj jardekoj. Kvankam unuafoje uzita dum la Proceso en Nürnberg, tiu okupo relative rapide populariĝis kaj hodiaŭ estas profesio de minimume 1 250 poliglotoj tra la mondo. Kontraŭe al la supozoj, Unuiĝintaj Nacioj ne estas la plej granda labordonanto de la samtempaj interpretistoj, sed la plej grandan

nombron da ili dungas Eŭropa Ekonomia Komunaĵo en Bruselo, kie postenas ĉ. 180 samtempaj interpretistoj. Probable nur Genevo, kun la tuta tiea aro da internaciaj organizaĵoj, havas pli da kvalifikitaj samtempaj interpretistoj.

En la komencaj jaroj post la ekuzo de la samtempa interpretado, la adeptoj de la nova profesio estis rekrutataj preskaŭ ekskluzive inter la judoj, kiuj pro sia ofte devigita migrado (interalie fuĝante antaŭ nazioj) sukcesis bone kaj komplete ekposedi plurajn lingvojn. Sed, kiam la demandoj pri spertaj konferencaj interpretistoj fariĝis ĉiam pli oftaj, kreiĝis ankaŭ specialigitaj lernejoj por la samtempa interpretado. La studentoj de tiuj lernejoj komencas siajn preparojn por la nova profesio per ekzercoj en la tradukado. Kvankam ĉiuj ambicias fariĝi interpretistoj, ege malmultaj sukcesas fariĝi kompetentaj praktikantoj de tiu metio. "Tre malgranda nombro da homoj posedas ĝuste tiun kombinon de kvalitoj, kiun postulas sukcesa samtempa interpretado. Apud la lingvaj kapabloj, necesas ankaŭ eksterordinara elteneblo, granda pensrapideco kaj tre varia eduka fono. Kvankam la tradukado sendube estas malpli febra laboro, ĝi apenaŭ postulas malpli da kapabloj ol la interpretado", tiel meditis renoma brita profesia interpretisto.

Bazaj kvalifikoj por fariĝi profesia interpretisto estas aktiva posedo de minimume du lingvoj, el kiuj kaj en kiujn oni kapablas traduki, aŭ du aŭ pli da pasive posedataj lingvoj, el kiuj oni kapablas traduki en unu aŭ pliajn aktive posedatajn lingvojn. Sed tamen, ne malpli grava ol tiuj bazaj lingvaj kapabloj estas ankaŭ la ekzisto de vigla scivolo kaj tre vastaj ĝeneralaj scioj. Krom tio, samtempa interpretisto senĉese frontas novajn ekzamenojn, ĉar la konferencoj, ĉe kiuj li interpretas, daŭre traktas novajn kaj ofte tute nekonatajn sciencobranĉojn aŭ vivkampojn. Por interpretisto, kiu devas praktiki sian profesion ĉe medicina konferenco, necesas, ke li antaŭ tiu aranĝo ne nur



"Kurioza duopo: Kissinger kaj Le Duc Tho en Parizo", notis konata magazino sub ĉi tiu foto. Efektive temas pri kurioza tripersona duopo, ĉar la interpretisto peras eĉ la ridon de la du politikistoj.



La teknika trono de kiu plej esence dependas ĉiu internacia konferenco en la mondo sen komuna lingvo.

trastudu ĉiujn disponeblajn materialojn, sed eĉ faru apartan liston de fakaj esprimoj, kiujn li povus renkonti en la konferencaj sesioj. Sen tiaj preparoj estas malfacile kredi, ke la interpretisto sukcesos bone plenumi sian profesion taskon.

En la sidejo de EEK en Bruselo, lastatempe aparte sentiĝas la manko de anglalingvaj kaj danlingvaj interpretistoj. Pri la danaj oni pli-malpli akceptas la mankon pro la simpla fakto, ke ili ne ekzistas, dum pri tiuj, kiuj interpretus el la angla kaj en la anglan, — plej ofte la kvalito ne kontentigas, malgraŭ la tiel vasta instruado de la angla ekster Britujo. Trovi la plurajn dekojn da mankantaj bonaj interpretistoj ne helpis eĉ la pli ol allogaj salajroj, kiujn proponas EEK: komencantoj ricevas pli ol 2 000 guldenojn monate, dum la estroj de la interpretistaj sekcioj atingas eĉ po 6 500 guldenojn. Tio ĉi estas nur la regula salajro, al kiu aldoniĝas repago de kostoj. La t.n. liberaj, nesalajrataj interpretistoj sukcesas enkasigi jare ofte pli ol 60 000 guldenojn.


Novicoj en la profesio de samtempa interpretado rapide perdas iluziojn kaj adiaŭas revojn, ke la interpretado venigos ilin en la societon de renomaj politikistoj kaj ke ili ĉeestos la grandajn momentojn, en kiuj oni faras gravajn decidojn. Tiaj interpretistaj laboroj estas zorge konservataj por la plej elstaraj praktikantoj de la nova profesio, inter kiujn oni viciĝas nur post multaj jaroj da pena laboro, ofte ligita al

sufiĉe prozaj temoj kiel ekz. bruta furaĝo, kamiona transporto, greno k.s. Sed, spite al tio, restas valida la postulo, ke bona interpretisto devas esti daŭre preta okupiĝi pri la tuta temgamo etendiĝanta de la problemoj pri porkonutrado ĝis pure filozofiaj demandoj.

La samaj konsideroj validas ankaŭ pri la malpli ekscita tasko de la profesia tradukisto. Salajroj de la tradukistoj en EEK progresas de 2 300 gld. ĝis 6 800 gld. monate. Dum la laboro de interpretisto estas intense streĉa dum mallongaj periodoj, tradukisto ofte laboras sub ne malpli iaciga premo kaj sen regulaj paŭzoj por ripozo. Normale oni atendas, ke tradukisto elmuelu ĉ. 2 800 vortojn tage; reviziisto devas atingi inter 5 600 kaj 7 000 vortojn. Sed en organizaĵoj kiel EEK, la postuloj estas ofte ligitaj ankaŭ al striktaj tempolimoj. Povas okazi, ke iu nova artikolo de la regularo atingas la traduksekcion je la 16a horo kaj devas esti ĝis la 17a jam tradukita, reviziita kaj nete tajpita por tuja teleksado al Luksemburgo, por ke ĝi aperu en la oficiala gazeto la postan matenon.

Laŭ brusela revuo, kiu antaŭ nelonge okupiĝis pri la samurba Babela turo, la interpretado kaj tradukado ŝajne estos ankoraŭ longe kaj ĉiam pli ofte bezonataj profesioj, des pli, ke "la entuziasmo pri la lernado de fremdaj lingvoj grave ŝrumpis, kaj la tendenco ŝajnas esti ligiĝo al sia gepatra lingvo, kion oni povus nomi lingva naciismo".

ĈI-SOMERE,
EN LA INTERNACIA
DOMO SONNENBERG
(SUR LA APUDA FOTO),
INTERNACIA LIGO
DE ESPERANTO-
INSTRUISTOJ (ILEI)
KONFERENCOS
PRI APARTAJ RILATOJ
AL LA INTERNACIA
LINGVO
KAJ ALIAJ
ASPEKTOJ DE:



Modelaj eksperimentoj

JAM LA KVINAN JARON sinsekve, Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) organizas apartajn konferencojn por trakti la ampleksan problemaron de la instruado de Esperanto en lernejoj. Post dufoja renkontiĝo en Maribor (Jugoslavio), Londono kaj Budapeŝto, ILEI, kiu estas kunlaboranta faka asocio de UEA, ĉi-jare decidis konferenci en la Internacia domo Sonnenberg, situanta en la bela regiono de Harz-montaro en FR Germanujo. La Konferenco estas planita por la periodo tuj antaŭ la ĉi-jara Universala Kongreso en Hamburgo, t.e. inter la 17a kaj la 26a de julio 1974.

Komence, kiam oni decidis okazigi la Konferencon en Sonnenberg, estis planite, ke ĝi traktu tre aktualan, kvankam unuavide eksterlernejan temon "Komunikaj problemoj de la gastlaboristoj", kion kelkaj periodaĵoj jam rapidis publikigi kiel ĉeftemon de la Konferenco. Krom kelkaj eksteraj faktoroj (ekz. eblecoj ricevi financan subtenon de la koncerna germana ministerio), la ŝanĝon de ĉeftemo diktis ankaŭ la fakto, ke ĝis la fino de januaro nur kvar membroj de ILEI esprimis intereson partopreni konferencon kun tia ĉeftemo. Tia sinteno ne devus surprizi tiujn kiuj scias, ke la fenomeno de gastlaboristoj apenaŭ estas konata ĝuste en kelkaj landoj, kiuj estas "ĉefbastionoj" de la instruista faka asocio. Tamen, en la programo de la Konferenco restis diskutvespero pri la temo "La problemoj de eksterlandaj infanoj en lernejoj — ĉu solvo per Esperanto?".

Laŭ informoj ricevita de la prezidanto de ILEI Helmut Sonnabend, la Konferenco detale traktos esencajn demandojn pri internaciaj lernejaj model-

eksperimentoj, pro kio ankaŭ la ĉeftemo de la Konferenco estos "La aspektoj de modelaj eksperimentoj rilate Esperanton". Apartan atenton oni ankaŭ ĉi-jare dediĉos al novaj spertoj kaj rezultoj de la kvinlanda pedagogia-didaktika eksperimento pri la oficiala enkonduko de la Internacia Lingvo en lernejojn. Krome, la Konferenco okupiĝos ankaŭ pri jenaj temoj: lingvaj grupigoj rilate lernejan eksperimenton; katalogo de sciencaj kaj praktikaj demandoj por lernejaj eksperimentoj; la frutempa instruado de la Internacia Lingvo en la elementa lernejo (2a ĝis 4a lernojaroj), ĝiaj motivoj kaj lernoceloj; metodoj de internacia testado; komputeraĵoj analizoj de testoj. Dum la Konferenco oni, kompreneble, resumos kaj analizos ankaŭ la aktualan aktivecon de tiu ĉi faka organizaĵo. Por la solena inaŭguro de la Konferenco oni planis festprelegon pri "Aspektoj de internacia lingvopolitiko".

Klopodante realigi ankaŭ alian gravan eron de sia dekjara perspektiva laborplano (traktita dum la pasintjara Konferenco en Maribor), ILEI en Sonnenberg planas apartajn praktikajn ekzercojn, kies celo estas prepari instruistojn por la Internacia Pedagogia Ekzameno, lanĉita dum la ILEI-konferenco en Budapeŝto en 1972 (v. *Esperanto* 1973, p.23).

Spite al la fakto, ke la programo de la Konferenco estas plenŝtopita, la organizantoj esperas, ke la partoprenantoj havos ŝancon almenaŭ parte profiti la restadon en la bela montara regiono, kiun celas ankaŭ tuttaga ekskurso, kiu eniris la programon. Pliajn detalojn pri la Konferenco oni petu de la prezidanto de ILEI: rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen, FR Germanujo.

Respondeca komuna tasko

EN LA ARTIKOLO de d-ro W. Bormann, prezidanto de la LKK en Hamburgo, publikigita en la gazeto *Heroldo* (16a de januaro 1974), troviĝas kelkaj formuloj, kiuj necesigas precizigon:

1. La titolo mem “Kongres-programo por Esperanto-turisto” povus facile kredigi, ke la Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo estas turisma aranĝo. Efektive, konforme al la baza koncepto pri la universalaj kongresoj kiel formulita en la Kongresa Regularo kaj sisteme evoluigita ekde 1949, ankaŭ la programo de la UK en Hamburgo konsistos el tri ĉefaj partoj (ĉiu kun multaj eroj): labora, kultura kaj distra. La pure turismaj punktoj apartenas al la distraĵoj. La celo de niaj universalaj kongresoj ne estas turismo (por tio ja ekzistas multaj aliaj eblecoj), sed “fortikigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la Movadon kaj studi ĝiajn problemojn”. Tio validas ankaŭ por Hamburgo.

2. En la artikolo tute ne estas menciita la Estraro de UEA, ĝia estrarano pri kongresoj kaj la Centra Oficejo de la Asocio. Oni ricevas la impreson kvazaŭ nur la LKK estus la organizanto. Efektive, la Estraro de UEA difinas la traktotajn temojn kaj la tutan labor-programon, inkluzive la tagordojn de ĉiuj oficialaj aranĝoj; la LKK, interalie, starigas la programon de aliaj kunvenoj, sed ĝin devas aprobi la Estraro de UEA; la C.O., sub la respondeco de la Direktoro, prizorgas la aliĝojn, librotendon, publikigon de la Kongresa Libro kaj aliajn teknikajn detalojn. Nur harmonia kunlaboro de la tri menciitaj organoj garantias sukcesan plenumon de tiu grava, kompleksa tasko. Tiel okazas ankaŭ ĉi-foje. Siavice, la organizantoj de la fakaj kunvenoj, same laboraj, prizorgas siajn respektivajn aranĝojn.

3. La artikolo informas, ke “la Alta Protektanto, edukministro D-ro von Dohnanyi, montris sian bonvolon al la Kongreso per salutmesaĝo en la kongreslibro, kio — kompare kun pasintaj jaroj — estas escepto”. Efektive, ĉefministroj aŭ, plurfoje, eĉ ŝtatestroj — la Reĝino de Nederlando, la Prezidento de Aŭstrujo, laste la Prezidento de Jugoslavio — estis Altaj Protektantoj de niaj UK, kio ĉefe ŝuldiĝas al la prestiĝa pozicio de UEA kombinita kun la aparte bona situacio de Esperanto en la koncernaj landoj. La salutmesaĝoj de la Altaj Protektantoj en la pasintaj jaroj tute ne estas esceptaj, sed normalaj kaj kutimaj. Ilin faris la Altaj Protektantoj de la UK en Portland (1972), Londono (1971), Vieno (1970) ktp. dum la Kongresa Libro de la UK en Beograd (1973) enhavis la foton de la Alta Protektanto kun lia aŭtografo.

La UK en Hamburgo estos certe altnivela laŭ la programo, tre verŝajne unu el la plej grandaj laŭ la nombro de partoprenantoj, kaj eble eĉ decida por UEA kiel la ĉefa organizita forto en la klopodoj efike disvastigadi la lingvon. La LKK kaj ĉiu unuopa ĝia membro streĉas siajn fortojn por sukcese plenumi sian parton de tiu respondeca komuna tasko kaj por reklamadi la Kongreson. Aliflanke, necesas ne forgesi la tutan evoluon de niaj UK en la postmilita periodo kaj la antaŭajn rimarkindajn atingojn sur tiu kampo.

Ivo Lapenna
Prezidanto de UEA



Hamburgo atendas grandan Kongreson

Formo kiu serĉas ĝustan enhavon



Daniel J. Evans: Belaj sed ankaŭ signifaj vortoj.

Lanĉita antaŭ kvin jaroj, Semajno de Internacia Amikeco ankoraŭ serĉas sian veran enhavon por transformiĝi de nobla ideo en mondiskalan manifestacion de interhoma proksimiĝo. Kvankam la ideo fontas el la Movado, ĝi ŝajnas pli rapide gajni popularecon ĉe ekstermovadaj instancoj.

ESTAS NEPRUDENTE en ĉi tiu okazo citi poeton, kiu asertis, ke la objektoj kaj personoj havas tian formon, kian al ili donas nia animo. Sed, se ni tamen tion faras, — ni nur celas hiperboligi la personan rolon de ĉiu unuopulo en lia rilato al iniciatoj, kiuj celas vekigi ĝeneralan interesigon kaj atendas same tian subtenon. Unu el tiaj iniciatoj, lanĉitaj de UEA, estas la Semajno de Internacia Amikeco, ĵus pasinta inter la 18a kaj 24a de februaro. Kiel tio ne malofte okazas, ĉi tiu nobla iniciato apenaŭ aŭ nur fojfoje kaj kelkloke vekis la agemulojn de la Movado, sed ĝi ankaŭ ĉi-jare ricevis valoran subtenon de ekstermovadaj instancoj. Estu permesite diri, ke SIA en kelkaj rondoj de la Movado trovis malmultan eĥon kaj kelkfoje rikoltis eĉ mokajn menciojn. SIA estas apenaŭ io plia ol nur bela iniciato, nur kadro, vazo eble de formo laŭplaĉa, — por ke oni en ĝin povu meti florojn, aranĝeblajn laŭ la propra gusto.

La iniciato neniam celis limiĝi al la interŝanĝado de salutkartoj, kvankam oni bonvolu ne subtaksi ankaŭ ilian gravecon en la kazoj de personoj, al kiuj skribas neniun, kiuj vivas en cirkonstancoj, en kiuj eĉ simpla amika salutvorto povas mildigi la angorojn kaj inkubojn de la ĉiutaga vivo. SIA povas esti tiu semajno de la jaro, en kiu oni atentigas la ekstermovadan mondon, ke la Internacia Lingvo kaj ĝia Movado (kun ĉiuj centoj da organizaĵoj) sian tutan aktivecon direktas

ĝuste al la internacia amikeco, al la homa proksimiĝo. Pri la neceso de unu neŭtrala internacia komunikilo oni ankoraŭ devas longe kaj pene konvinkadi grandan parton de la ĝenerala publiko kaj des pli la oficialulojn kaj gravulojn de ĉi tiu mondo, sed la neceson de interhoma amikeco neniun plu kontestas. Kun la apogo de niaj iniciatoj, kun elmontrado de simpatio al ili, oni ofte kaj spite al sia tuta diplomatia rutino venas en la situacion mencie agnoski ankaŭ pli ĝeneralajn kaj pli gravajn verojn rilate la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-movadon.

Kiam antaŭ du jaroj la usona urbego Ĉikago pioniris en la ekstermovada apogo al la iniciato pri SIA, oni emis tion vidi kiel ruze eltorditan ĝentilaĵon, kiel atingon sen gravaj reeĥoj. Montriĝis tamen, almenaŭ en la kazo de Usono, ke la ekzemplon de Ĉikago la postan jaron (1973) sekvis ne nur kelkaj aliaj urboj (Portland, Sanfrancisko, St. Petersburg, Tampa), sed ankaŭ la tuta federacia ŝtato Illinois. Montriĝas ĉi-jare, ke al la usonaj apogantoj de SIA aliĝas la federacia ŝtato Vaŝingtono kaj ripetigas la apogo de Sanfrancisko. Kaj, se tio en la antaŭaj jaroj ne estis tute klara, se ĝi adekvate ne resonis en la Movado, almenaŭ la ĉi-jaraj proklamoj venantaj el Usono ne limiĝas al sole formala subteno de la Semajno, sed ili enhavas interesajn agnoskojn pri la monda lingvo-problemo, gravajn kvalifikaĵojn de la Internacia Lingvo kaj prestiĝajn menciojn de UEA. Jen du ekzemploj:

“... mi, Daniel J. Evans, estro de la ŝtato Vaŝingtono, per ĉi tio proklamas Semajnon de Internacia Amikeco ekde la 17a ĝis la 23a de februaro 1974, en la ŝtato Vaŝingtono, kio koincidas kun mondskala kampanjo aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio, kies celo estas transponti la mankon de komunikado kaj kompreniĝo inter ĉiuj popoloj.”

“Sanfrancisko tre bone konscias la lingvan diversecon kaj la gravecon kaj bezonon de interkompreniĝo trans internaciaj landlimoj.

El ĉi tiu bezono por komuna rimedo de komunikado inter diversnaciaj vizitantoj, kreskis ‘dua lingvo’ formale konata kiel Esperanto.

Kalifornia Ŝtata Universitato en Sanfrancisko pioniris en la instruado de ĉi tiu internacia lingvo, altigante la prestiĝon de Sanfrancisko kiel urbo, kiu volonte iras duonon de la vojo por lingve renkontiĝi kun siaj alilandaj vizitantoj.

Nun, pro tio, mi, Joseph L. Alioto, estro de la urbo kaj graflando Sanfrancisko, per tio ĉi proklamas la semajnon de la 18a ĝis la 24a de februaro 1974 kiel Semajnon de Internacia Amikeco en Sanfrancisko, kio dumas mondvastan kampanjon sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio, kies celo estas transponti la breĉon en la komunikado kaj interkompreniĝo de ĉiuj popoloj.”

Troviĝos en la Movado homoj, por kiuj multe pli gravos, ke la du cititaj eminentuloj hazarde ne indikas tute identajn datojn de SIA, ol la vortoj, kiujn enhavas la du proklamoj. Sed, ĉu troviĝos en la Movado sufiĉe da tiuj, kiuj bonvolos kaj kapablos ĝuste aprezi la atingaĵojn de usonaj esperantistoj, kiuj pere de la popularigo de la Semajno de Internacia Amikeco popularigas ankaŭ la Internacian Lingvon? Ĉu vere necesas sekvi la malnovan kutimon de prisilenta rilato al ĉio, kio estas iniciato de “iu alia”? Ĉu sufiĉas



Joseph L. Alioto: Konscio pri la lingvo-problemo.

plendi, ke SIA havas nur supraĵan, formalecan enhavon, se la kampo estas tiel vasta, ke ĝi al ĉiu unuopulo permesas esence influi kaj laŭplaĉe muldi tiun enhavon? Ĉiukaze, SIA estas kaj estos tia, formaleca aŭ enhavoplena, depende de la rilato de ĉiu unuopulo al ĝi. Se nia rilato al SIA estos pli pozitiva, jam venontjare ĝi povos ekhavi tiujn mondscalecon kaj mondvastecon, kiujn aludas la usonaj ŝtatestro kaj urbestro.

sm

La Internacia Ekzameno

LA INTERNACIA Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn en Hamburg (FR Germanujo), okaze de la Universala Kongreso. Povas esti allasita nur persono, kiu sukcese finis per diplomigo minimume mezgradan lernejon kaj kiu plene posedas la Internacian Lingvon. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi, bonvolu sendi laŭeble plej frue (limdato: la 28a de aprilo) al la sekretario de la IEK (d-ro J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo): esperantlingvan tradukon de la diploma pruvanta, ke la kandidato finis mezlernejon (la ĝusteco de la traduko devas esti konfirmita de kompetenta instanco) kaj ateston pri sukcese plenumita supera ekzameno de Esperanto en sia lando, aŭ alian pruvon pri plena posedo de la lingvo. La kotizo por la ekzameno estas 7,20 gld. aŭ egalvaloro, kaj devas esti pagita samtempe. Por kandidato, kiu pro registraj

reguloj absolute ne povas antaŭpagi la kotizon, sed kiu vere atendas ĉeesti la Kongreson, ekzistas ebleco de speciala aranĝo.

Laŭ la Regularo de IEK, sukceso en la ekzameno devas “atesti, surbaze de rigora ekzameno, la kapablon instrui Esperanton je supera nivelo”. Kandidatoj do atendu ekzamenon, kies kriterioj similas tiujn por universitata diploma. Detala regularo kaj listo de rekomendita literaturo estas ricevebla de la sekretario de la IEK aŭ de la Centra Oficejo de UEA. De la Centra Oficejo estas mendebla ankaŭ listo de 79 specimenaj demandoj, kiuj estis efektive prezentitaj en la Internacia Ekzameno inter 1962 kaj 1972. Ili donas al la kandidato klaran imagon pri la speco de ekzameno, kiun li frontas. Prezo de la specimena demandaro: 3 respondkuponoj (1,50 gld.) inkl. afrankon.

Sub ĉi tiu rubriko aperas tekstoj verkitaj por la nova eldono de “Enciklopedio de Esperanto”

Marjorie Boulton

MARJORIE BOULTON, anglino, estro de instruistina kolegio ĝis 1970, poste laboras precipe kiel verkistino. Ŝi naskiĝis la 7an de majo 1924, en Teddington, Middlesex, kaj edukiĝis en ŝtataj lernejoj kaj en la Kolegio Somerville de Oksforda Universitato. Post diplomiĝo pri la anglaj lingvo kaj literaturo, ŝi faris postdiploman studadon, ricevante en 1948 la esploran diplomon “B. Litt.” pro disertacio pri la ŝekspirologo William Richardson (1743-1814). La postan jaron ŝi eklernis Esperanton, kaj aperis ŝia anglalingva poemaro *Preliminaries* (antaŭpreparoj). En la sekva jardeko ŝi estis eksterordinare aktiva en la verkado kaj en la angla kaj en Esperanto. Angle aperis vico da enkondukaj libroj pri literaturaj kaj semantikaj temoj, Esperante aperis ŝiaj du grandaj poemkolektoj *Kontralte* kaj *Eroj*. Sekvis en 1960 aŭtoritate esplorita kaj belstile verkita biografio de Zamenhof, en versioj angla (1960) kaj Esperanta (1962). En tiuj ĉi jaroj M. Boulton ankaŭ alpaŝis novan genron, per dramaro *Virino ĉe la landlimo* (1959). Sekvis en 1967 novelaro *Okuloj*.

Marjorie Boulton debutis kiel Esperanta verkisto per poemo en *Esperanto en Skotlando* kaj tiel tuj elvokis la intereson kaj entuziasmon de alia nova poeto, William Auld. Kiam ŝia unua poemaro en Esperanto aperis, estis evidente, ke en la malmultaj jaroj de sia esperantisteco ŝi komplete ekmaĵstris la poezian idiomon de la Internacia Lingvo, kaj ne nur regis sed ankaŭ plilarĝigis la atingojn de la Esperanta metriko. Kontribuis al tiu teknika flueco la sperto akirita kiel anglalingva poetino, ne nur originala sed ankaŭ traduka, kaj ankaŭ la multjara studado de la angla literaturo, kies spuroj estas ĉie videblaj en ŝiaj poemoj. Komparante la anglalingvan poemaron kun *Kontralte* oni tuj rimarkas la pli simplan esprimmanieron de la Esperantaj poemoj. La Esperanta poezio de Marjorie Boulton estas plejparte konstata poezio: la poemoj

prezentas ĉiutagan veron per ĉiutagaj esprimoj. Kelkfoje la voĉo fariĝas pli riĉa, ĉu pro la sonoraj tonoj de poemo kiel “Memnon” (unu el kelkaj ŝiaj poemoj kiujn oni muzikigis), ĉu pro riĉigo kaj komplikigo de la metaforoj. Sed la ĉefan malforton de la anglalingvaj verkoj — abundigo de la metaforoj ĝis troŝarĝo — oni apenaŭ trovas en la Esperantaj. Kvankam la anglalingvaj pecoj estas ofte tre personaj, ekzistas ia stila vualo inter la personeco de la aŭtorino kaj la poemoj mem. Tiu vualo mankas en la Esperantaj versoj. Ili estas eksterordinare personaj poemoj, respegulante la vivon kaj emociojn ne de iu “parolanto” de la strofoj, sed de la poetino mem. La poemoj pritraktas ŝiajn rilatojn kun la studentinoj kaj kun ŝiaj kolegoj, kaj ili priskribas kun detala sed samtempe larĝa alvido la psikajn krizojn kaj evoluojn de delikata kaj tenera personeco. En la posta poemaro, *Eroj*, oni rimarkas maturiĝon de la burĝona talento de *Kontralte*. La temoj estas pli diversaj, la poeziaj formoj pli variaj, kaj la metaforoj pli riĉe kunordigitaj. Sed la esprimmaniero restas relative simpla kaj la formoj tradiciaj. Se entute ekzistas manko en la poezio de M. Boulton, ĝi kuŝas en la emo, egale en la enhavo kiel en la tekniko, celi simplajn solvojn al kelkfoje komplikaj problemoj. Tio kondukas al brilaj sukcesoj sed ankaŭ al malsukcesoj foje.

Dum en *Eroj* oni trovas la pensulan poezion de la aŭtorino, en *Cent ĝojkantoj* troviĝas ekzemploj de ŝia pura kaj faciltona lirikeco — tiu ŝajne senpena lerto, kiu parte ebligis ŝian grandan elverŝon de poemoj dum la koncerna jardeko. La tradukaj verkoj de M. Boulton inkluzivas tradukojn en la anglan, kiuj utiligis Esperanton kiel pontlingvon, kaj unu tutan libron tradukitan en Esperanton. Ŝiaj tradukoj de anglalingvaj poemoj, noveloj kaj romaneroj (el kiuj pluraj modernaj) aperis dise en la Esperanto-gazetaro.

La teatraĵoj estas esence minora flanko de ŝia talento, sed la versa tragedio *Virino ĉe la landlimo* estas verko de konsiderinda potenco, dum la skeĉoj en tiu sama volumo estas multe ludataj de esperantistaj amatoroj. Marjorie Boulton jam pruvis sian talenton kiel prozisto antaŭ la apero de ŝiaj noveloj. Krom la anglalingvaj verkoj pri literaturo ktp., aperis diversaj ŝiaj eroj en anglaj gazetoj, kaj en Pollando aperis tradukoj de du kriminalromanoj. *Okuloj* (1967), la novelaro, estas iasence daŭrigo de la temaro de la poemoj — pritrakto de temoj humoraj, misteraj, kelkfoje iom didaktikaj. Kvankam ŝi bone komprenas kaj praktikas la strukturajn trajtojn de noveloj, la aŭtorino ne tiel bone majstras dialogon kaj la kreon de karaktero. Sekve la plej sukcesaj noveloj estas la parabolecaj, aŭ personaj (ekzemple “Mezepoka historio”, “Ebrivirgeco”).



Marjorie Boulton: Tenero kaj erudicio

Plurfoje M. Boulton estis premiita en la Belartaj Konkursoj dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kaj en 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko.

La aktivecoj de Marjorie Boulton en la Esperantomovado inkluzivis prelegvojaĝojn (el kiuj unu al

Hungarujo), gvidadon de kursoj, kaj ofidadon kiel Sekretario de la Internacia Somera Universitato (1957-62). De 1961 ĝis 1967 ŝi estis Sekretario de la Komisiono de UEA pri la Internacia Ekzameno. Aktiva kiel apoganto de Esperanto-instruado en la lernejoj, ŝi dumlonge prenis gvidan rolon en la someraj kursoj en la Kolegio Wedgwood Memorial, en Barlaston, Anglujo, kaj en 1969 oficis kiel Prezidanto de la Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj.

VERKOJ DE MARJORIE BOULTON: *Preliminaries* (London, 1949), poezio; *The Shell and the Ear*, de Jules Supervielle (Hull, 1951), tradukita poezio; *The Anatomy of Poetry* (London, 1953), priliteratura verko; *Wild Chestnuts*, de Vlasta Uršić (Stoke-on-Trent, 1954), tradukita poezio; *The House at the Toll-Gate*, de Vlasta Uršić (Stoke-on-Trent, 1954), tradukita poezio; *The Anatomy of Prose* (London, 1954), priliteratura verko; *Kontralte* (La Laguna, 1955), poezio; *Kvarpieda kamarado: Taglibro de kelkaj monatoj kun siama katido* (Burslem, 1956), prozo; *Cent ĝojkantoj* (Stoke-on-Trent, 1957), poezio; *Virino ĉe la landlimo: Drameto kaj skeĉoj* (Kopenhago, 1959); *Eroj, kaj aliaj poemoj* (La Laguna, 1959); *Saying What We Mean* (London, 1959), semantika studo; *Window on Nepal*, de Tibor Sekelj (London, 1959), tradukita prozo; *The Anatomy of Drama* (London, 1960), priliteratura verko; *Zamenhof, Creator of Esperanto* (London, 1960); *Zamenhof, aŭtoro de Esperanto* (La Laguna, 1962); *Dekdu piedetoj* (Stoke-on-Trent, 1964), prozo; *Words in Real Life* (London, 1965), lernolibro; *Okuloj: novelaro* (La Laguna, 1967); *Nia sango* (Londono, 1970), dramo; *Reading for Real Life* (London, 1971), lernolibro; *Ni aktoras, tri komedietoj* (Aabyhøj, 1971).

Humphrey Tonkin

Leterkesto

Skribas Andreo Šalamon (Israelo):

Kion signifas la mallongigo sur la kovrilpaĝo de la revuo: NE ISSN 0014-0635?

Respondas la redakcio: La numero NE ISSN 0014-0635 sur la kovrilo de la revuo estas internacie agnoskita kodo por identigo de periodaĵoj. Tiu ĉi numero estas asignita al la revuo *Esperanto* kaj sole nur al ĝi. Sekve pere de tiu ĉi numero, ĉiu biblioteko kaj abonpetanto tra la mondo povas trovi la revuon en katalogoj k.s. Tiun sistemon starigis la Internacia Norm-Organizo en Ĝenevo.

Skribas Richard E. Wood (Usono):

Tre ofte profesiuloj publikigas en la Jarlibro kaj revuoj nur la hejman adreson. Eble tio estas bona por eventualaj vizitantoj al iliaj hejmoj, sed ne por serioza profesia korespondado. La politiko de mia universitato estas pagi la poŝtkostojn de mia korespondado kun kolegoj ĉe aliaj edukaj institucioj, — sed nur al

instituciaj adresoj! La profesiuloj en la Esperantomovado profesiigu siajn interrilatojn kun kolegoj tutmonde, publikigante kaj uzante sian profesian adreson.

Skribas Sven Möllestad (Svedujo):

La glumarko de la Universala Kongreso en Hamburgo estas ne nur bela sed ankaŭ tre karakteriza por la hansa urbo. Sendube, ke estas gravege atenti bonan propagandilon en diversaj rondoj, unuavice en la kongreslando mem.

Skribas Ŝibajama Ĵun-iĉi (Japanujo):

Se vi estos demandita de malbona lango: “Ĉu koro aŭ kolo, longa lo aŭ ronda ro?”, ĉu vi komprenos pri kio temas? Japanoj ĝenerale malbone distingas R kaj L, pro kio en nia grupeto estiĝis la amuza demandeto pri longa lo kaj ronda ro, kiu krom la identeco de la komencaj literoj aludas ankaŭ la formon de la respektivaj minuskloj. Eble ankaŭ ne japanoj bonvolu akcepti ĉi tiun etan helpmetodon!

Novtipa lernilo

Recenzas Claude Gacond (Svislando):

Je parle esperanto, de Jean Thierry. Verviers: Marabout Flash, 1972. 160p. 12cm.

La libro-kolekto "Bibliothèque Marabout" proponas al la kioska publiko kvadrat-formajn libretojn, plaĉ-aspektajn, kiuj tuŝas plej diversajn temojn kaj estas speco de konstante renovigata enciklopedieto. La lernolibro, kiun ni pritraktas, aperis en la fako *turismo kaj lingvoj*. Tio tuj klarigas ĝian enhavon, kiu pli rememorigas turismecan vortareton, ol gramatikon por komencantoj.

Fakte, Jean Thierry adaptis al Esperanto metodon ellaboritan antaŭ ĉio kiel enkonduko al la studo de etnaj lingvoj. La "Flash-metodo" havas kiel celon doni al turistoj ideeton pri la lingvo parolata en la vizitota lando. Ĝi proponas laŭtemajn vortlistojn kaj fundamentajn frazojn tuj uzeblajn en okazo de neceso. La desegnaĵoj humurplene respegulas la kutimojn de la malkovrota gento. En *Je parle esperanto* la ŝerc-desegnaĵoj bedaŭrinde estas sen rilatoj kun la kutimoj, kiuj karakterizas la Esperanto-vivon. La talento de Lucien Meys estus certe trovinta nutron en la observado de la "verda popolo".

Serio da "flaŝoj" aŭ fulm-fotoj komprenigas al la lernanto la apartajn trajtojn de la Internacia Lingvo. En tiuj tekstoj la talento de Jean Thierry sin libere esprimis, kaj la rezulto estas laŭdinda. Inter tiuj trafikaj klarigoj proponiĝas al nia studemo abundaj vortlistoj pri temoj utilaj al vojaĝantoj. Tekstoj absolute mankas. La lernanto devas antaŭ ĉio asimili vortojn. Mi dubas pri la sukceso de tiu metodo. Mi ne konsilus tiun lernolibron al komencanto. Oni ĝin uzu antaŭ ĉio kiel komplementon al aliaj lernolibroj. Kiuj deziras riĉigi sian vortprovizon, tiuj sciu, ke en la trastudo de *Je parle esperanto* ili trovos abundan nutron. Pedantu-loj certe kritikos la esperantigon de certaj vortoj. Tamen oni povas fidi al la proponitaj vortlistoj. Kelkaj neeviteblaj prezeraroj ornamas tiun unuan eldonon, sed la aŭtoro ilin certe jam rimarkis kaj ili malaperos en la dua eldono. Ni esperas, ke tiam la aŭtoro rezignos transskribi la Esperantan vokalon e per la franca é. Kiel faris unu jaron antaŭe Michel Duc Goninaz en sia *Vocabulaire espéranto*, li preferu la pli ĝustan transskribon è. Kaj sur la titolpaĝo li kuraĝe komplete francigu la nomon de la lingvo skribante *espéranto*. Krome, kiel tio okazas por la aliaj lingvoj, Jean Thierry verku duan libreton kun la titolo *Je me perfectionne en espéranto*. Tiam tekstoj fine alportos al la novicoj la atendatajn legaĵojn, kiuj mankas en la elementa lernilo.

Se la eldonejo *Marabout* intencis proponi facile uzeblan gramatikon por komencantoj, ĝi malsukcesis. Tiam, anstataŭ adapti metodon por la naciaj lingvoj, ĝi devintus ellabori ion originalan, kio respondus al la karaktero de planlingvo. Sed se, aliflanke, la eldonejo *Marabout* volis komprenigi al vasta publiko, ke Esperanto estas lingvo kiel la ceteraj, ke ĝi estas bel-



FLASH

BIBLIOTHÈQUE MARABOUT



sona, riĉa kaj lernenda, tiam ĝi plene sukcesis. Tiu libreto vekas simpatian al la lingvo, kaj ĝi samtempe indikas la adresojn de Esperanto-organizaĵoj.

Mendu ĉe UEA: 3,60 (por Nederlando 3,74) gld. plus sendokostoj 10%.

Por dekjaruloj

Recenzas Elisa Kehlet (Danlando):

Morso-Klubo, de Robert Fisker. Trad. Gudrun Riisberg. Åbyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1973. 32p. 21cm. ISBN 87-85020-702.

La libro enhavas du historiojn pri la samaj knaboj; en la unua, grupo da amikoj uzas morsadon ne nur por amuziĝi, sed ankaŭ por savi sin el danĝera situacio. En la alia, "Trezorserĉado", la entreprenemo de la knaboj finiĝas per granda surprizo.

Ĉi tiun libron mi rekomendus al geknaboj proks. 9-12 jaraj, kaj al kursestroj kun gelernantoj en tiu aĝgrupo. Pro kelkaj tajperaroj plenkreskulo devus kontroli la libron antaŭ ol doni ĝin al infanoj.

Mendu ĉe UEA: 2,10 (por Nederlando 2,18) gld. plus sendokostoj 10%.

Preskaŭ enciklopedieto

Recenzas D.B. Gregor (Britujo):

Terminaro por bibliaj studoj, de G. Rust kaj D. Broadribb. Ravenna: IABO, 1973. 79p. 24cm.

Post la *Kristana Terminaro de Dia Regno* (1967-73) la teologo jen ricevas duan pliriĉigon per ĉi tiu verko, kies bazo estas malneto, lasita de la meze de sia laboro kruele forŝirita Esperanta teologo G. Rust. Pli ol fakterminaro, ĉi tiu listo de 851 eroj konsistigas enciklopedieton de teologiaj temoj, kaj ŝuldas sian estiĝon al la specifa bezono “servi al la komitato preparanta novan tradukon de la Biblio”. Kun admirinda klareco ĝi tuŝas la problemojn, kiujn alfrontas ĉiu tradukonto de la du Testamentoj: kiel literumi la proprajn nomojn; kiel numeri la Psalmojn; kiel redoni teknikajn vortojn de la Pentateŭko, de la Profetoj, la Evangelioj, kaj S-ta Paŭlo; ĝis kia grado oni devas preni en konsideron la jam enradikiĝintajn formojn de la Zamenhofa MT.

Pli interesaj por la ĝenerala studanto de la Biblio estas la sciigoj pri diversaj flankaj aferoj: la nomoj de la MT-aj libroj en la antikvaj tradukoj; la apokrifaj libroj de ambaŭ Testamentoj kaj la pseŭdepigrafaĵoj de la NT; la Mortmaraj manuskriptoj; la koncernaj verkoj de Josefo, Filono, kaj la Apostolaj Patroj; Talmudaj kaj netalmudaj libroj; rabenaj terminoj; la religia kaj politika fono de la NT (no. 637 *prokuratoro* bezonas precizigon); la ekvivalentoj de antikva mezuroj; kaj diversaj Tekstoj. (Kelkaj korektoj en BR 1973/2). Kaj ĉi tiu grava verko preskaŭ perdiĝis! Ne trovite inter la paperoj de la mortinto, ĝi ŝajnis esti suferinta la sorton de tro multaj aliaj Esperantaj dokumentoj, kiam finnlanda kunlaboranto elpaŝis kun kopio. Ni estu avertitaj: Esperantaĵoj estas valoraĵoj kaj do kun antaŭsciigo testamentindaj.

Mendu ĉe UEA: 5,88 (por Nederlando 6,12) gld. plus sendokostoj 10%.

Ekscita grandromano

Recenzas Lajos Tárkony (Hungarujo):

Patroj kaj filoj, de I. Turgenev. Trad. d-ro K. Bein (Kabe). Åbyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1973. 215p. 20cm.

La romano laŭdire naskiĝis en 1862 sub la influo de la kritikisto Dobroljubov, kiu riproĉis la aŭtoron pro la

pasiveco de liaj herooj kaj postulis, ke oni montru, anstataŭ la pli-malpli malbonkonsciencaj nobeloj, “superfluaĵoj homoj”, — la novan generacion, tiun de la ago. La heroo de la romano, Bazarov, rompas kun la sentimentaleco de la patroj, turnas sin al la natursciencoj, estas malvarma, sobra, froste objektiva; oni nomas lin “nihilisto”. La progresemaĵoj tamen ne estis kontentaj pri la romano pro ties “estetismo”; fakte, Bazarov, la “revoluciulo” mortas de sepsismo, ŝajne tial, ĉar la aŭtoro ne sciis kion per li komenci. Tamen la libro estas ekscita “granda” romano, majstra per sia epok-pripentro; la figuro de Bazarov estas interes-kapta, iel altira kaj repuŝa samtempe; por adoleskantoj siatempe kaj probable ankaŭ nun li povas ŝajni speco de idealo.

La traduko de KABE estas klasik-lingvaĵa, agrable klara, facilflua. Stojan en sia Bibliografio ĝin mallaŭdas, eble pro zorga komparo kun la originalo; mi, kontraŭe, miris, kiel freŝa estas ĝia teksto: oni povus ĝin opinii nuntempa. Sed la lingva kontrolo de la Literatura Komitato FLE ne kontentigis min. Oni “enkorektis” abomenajn formojn laŭ la ekzemploj “tiajn homojn, *kia* li”, “tia sama, *kia* li” (anst. *kiel*), aliparte lasis en la teksto: *stoiko* (stoikulo), *liberalo* (liberalulo), *antaŭ kiam* (antaŭ ol). Ĉe indiko de la parolanto estus bone remeti la personpronomon antaŭ la verbon: “*Ho — li diris —*” (ne: “*Ho — diris li —*”), konforme al la nuna (zamenhofa) uzado. Krome: glosanto nepre ne erarigu! *Humoralisto* ne estas moralisto, sed adepto de malnova medicina skolo. *Anglomeno* (ĝuste: anglomano) estas ne “anglosakso”, sed “anglomaniulo”.

La eldonaĵo estas grava gajno por nia literatura kulturo.

Mendu ĉe UEA: 10,80 (por Nederlando 11,23) gld. plus sendokostoj 10%.

Emo dubi

Recenzas Roger Bernard (Francujo):

Arbo de la sciado, La, de Pío Baroja. Trad. el la hispana F. de Diego. La Laguna: Stafeto, 1973. 231p. 22cm.

Ofte stariĝas la demando, ĉu unue legi la antaŭparolon al verko, aŭ nur poste. Kvankam mi opinias plej bona la duan metodon, mi komencis, ĉe tiu verko, legante la 10-paĝan aŭtor-kaj verko-prezenton de Juan Régulo Pérez. Se la paĝoj de la revuo *Esperanto* ne estus tiel dense plenaj, tiu prezento povus esti la plej taŭga recenzo pri la libro. Sekve mi atendis grandan ĝuadon de la tiel laŭdata verko.

Kaj fakte granda estis mia seniluziiĝo. La romano, se romano, montras homon, Andrès, kiu, ekde siaj studentaj jaroj ĝis sia morto post mallonga kariero kiel kuracisto, renkontas proksimume ĉiujn tipojn

de hispanoj de tiu tempo (1890-1900). Volante priskribi sian landon kun ĝiaj mankoj, la aŭtoro pentras per plej simpligitaj, neevidentaj, arbitraj trajtoj burĝojn, aristokratojn, profesorojn, komercistojn, virinojn, popolanojn, vilaĝanojn, ĉiujn: sensciaj, paradaĵ, friponaj, kanajlaj, uzuristaj, diboĉaj, stultaj, putinaj, meretricaj, ktp. En la 222-paĝa libro ne troviĝas simpla kaj honesta figuro, krom eble la amikino, poste fianĉino, de la protagonisto, kvankam ŝi estas ne malofte montrita kiel "histeria". Mi ne povas kredi, eĉ se ĉiuj tiuj tipoj devis esti, en la penso de la aŭtoro, nur la simboloj de ĉio malbona kaj pli/malpli putra en la tiama Hispanujo, ke tiu lando konsistis nur el tiuj aĉaj homoj. Kiel do ĉi lastaj povis naski tiujn hispanojn el miaj amikoj, kiuj estas simpatiaj, laboremaj, lojalaj kaj kleraj? Franca proverbo asertas "Kio tro multe pruvi volas, nenion pravas". La protagonisto mem, ne komforta en sia vivo kaj en la diversaj medioj, baraktas inter la polusoj de du malsamaj filozofiaj konceptoj pri la vivo kaj la mondo, konkretigitaj en la Arbo de la Sciado kaj la Arbo de la Vivo (Genezo). Laŭ Régulo Pérez, inter tiuj du konceptoj ŝanceliĝis en sia vivo la aŭtoro, kaj tio ne multe helpas al la kompreno de lia celo. Almenaŭ *min* tio ne helpas. En Hispanujo, post la intercivitana milito, la verko estis ofte, ĉar konsiderata de iuj rondoj kiel "perversa" (!), viktimo de aŭtodafeoj. Mia prijuĝo rezultas nur el literatura vidpunkto. Sed la fakto, ke Régulo Pérez, spertulo pri i.a. hispana beletro, subtenas la verkon kaj la aŭtoron, estas sufiĉa pruvo pri mia netaŭĝeco kiel literatur-observanto.

La traduko estas senriproĉa: memkompreneble ĉar de Diego.

Mendu ĉe UEA: 13,20 (por Nederlando 13,73) gld. plus sendokostoj 10%.

Atako al milito

Recenzas E. Borsboom (Nederlando):

La krimo de l'milito, de Juan Bautista Alberdi. Trad. Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina Esperanto-Instituto, 1973. 212p. 15cm.

La diligenta tradukinto elektis tiel gravan kaj havendan eseon el la socipolitika literaturo, ke oni nur miras, ke ĝi jam pli frue ne estas publikigita en Esperanto. La titolo "La krimo de l'milito" indikas, ke temas pri pacifista verko. Ne en formo de propaganda broŝuro, Juan Bautista Alberdi atakis la fenomenon "milito", sed li tion faris per signifoprofunda eseo, prilumiganta ĉiujn ĝiajn facetojn. Por tio li bezonis 112 malgrandajn ĉapitrojn, en kiuj li ekde la romianoj pritraktis la trajtojn, respondecojn kaj rezultojn de la militoj, la ideojn de cazarismo kaj neŭtraleco, la internacian kodon kaj, en la fina parto, perspektivon de la estonteco. Mi preterpasus la limojn de ĉi tiu artikolo, se mi amplekse komentus la enhavon de la eseo. Nur unu detalon mi

volas mencii: la nekredeblan aktualecon kaj validecon de la vidpunktoj. Alberdi profete antaŭdiris en 1869 tion, kun kio ni cent jarojn poste ankoraŭ luktadas. La lingvaĵo de Ergoto estas glata, kvankam ne modela. Malgrandan penon mi spertis kun la transskribo de propraj nomoj. Ergoto interkrampe aldonis nur la nacilingvajn, se laŭ lia arbitro la persono ne estis fama. Tamen necesis legi kelkajn ĉapitrojn antaŭ ol mi travidis la nomon "Grocio". Ĝi apartenis al mia eminenta samlandano Hugo de Groot (latinigita: Grotius). Enigmo restis la uzado de Anglatero anstataŭ Anglujo?

Kial ne iom pli da atento por la ekstero de la mondo? Cetere, *La krimo de l'milito* indas je granda legantaro pro la klasika enhavo en facila lingvo.

Mendu ĉe UEA: 12,72 (por Nederlando 13,23) gld. plus sendokostoj 10%.

Traduko pala kaj lama

Recenzas F. de Diego (Hispanujo):

Junulejo, de M. Cané; **La buĉejo**, de E. Echevarría. Trad. Ergoto de Bonaero. Buenos Aires: Argentina E-Instituto, 1973. Kserografie presita. 128p. 17cm.

En la hispanlingva originalo *Juvenilia* (Junulejo) estas ĉarma verko de la argentinano Miguel Cané (1851-1905), aŭtobiografia rakonto — ankoraŭ freŝa kaj interesa — el liaj jaroj de mezlernejo.

El matadero (La buĉejo) de la argentinano Esteban Echevarría (1805-1851) priskribas en nur kelkaj paĝoj, kun impresa kaj realisma stilo, epizodon barbaran, harstarigan, kiu okazis en la jaro 1838, kiam la tirano Rosas regis per fera pugno la argentinan teron.

Bedaŭrinde, la esperanta traduko de ambaŭ pecoj redonas pale, lame, ne malofte eĉ karikature, la belojn de la originaloj. Preskaŭ ĉiupaĝe troveblas eraroj sintetiaj, sintaksaj, semantikaj kaj eĉ ortografiaj. Pro manko de atento, Ergoto eĉ tradukis vortojn hispanajn per ties maloj ekz. sur la paĝo 38: "Pluraj *amikoj* de Ĵako volis" anstataŭ "Pluraj malamikoj de Ĵako volis"; sur la paĝo 35: "kun *mallarĝa* frunto plena de" anstataŭ "kun larĝa frunto plena de".

Li uzas *ignori* anstataŭ *nescii*, *fini*, anstataŭ *finiĝi*, *peti al* anstataŭ *peti de*, *aprobi* iun (ĉe ekzameno) anstataŭ *tralasi* iun, *vagemo* kaj *vagulo* anstataŭ *bohemo* kaj *bohemiano*. Sur la paĝo 119 legeblas: "ĝiaj okuloj (elĵetis) *furorajn* rigardojn."

Daŭrigi la liston de nur la gravaj eraroj estus laboro tede longa. Per ĉi tiaj du tradukoj, Ergoto faras nenian servon al la argentina beletro, al Esperanto kaj al si mem.

Mendu ĉe UEA: 9,54 (por Nederlando 9,92) gld. plus sendokostoj 10%.



59-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Hamburg, 1974 07 27 — 08 03

Alta Protektanto: D-ro Klaus von Dohnanyi, Ministro pri Klerigo kaj Scienco de FR Germanujo.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 3002, Nederlando.

Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo.

Saluto de Willy Brandt

La Federacia Kanceliero Willy Brandt, Nobel-premito pri paco, afable konsentis saluti la Universalan Kongreson per mesaĝo presota en la Kongresa Libro.

Ampleksa Dua Bulteno

Ĝus aperis 32-paĝa Oficiala Bulteno (dua), kiun oni sendas al ĉiuj aliĝintoj de la Kongreso. La ilustrita kajero enhavas interalie detalojn pri la provizora programo, utilajn informojn pri Hamburgo kaj pri la Kongreso ĝenerale, priskribon de la loĝsituationo, ekskursoj kaj postkongresaj aranĝoj, kaj mendilojn por loĝado, bankedo, ekskursoj kaj postkongreso.

Estas ankoraŭ senpage ricevebla, ĉu por unuopaj interesitoj, ĉu por distribuo en kluboj, kongresoj, kun gazetoj k.s., la Unua Oficiala Bulteno, kune kun la aliĝilo. Oni bv. adresi la petojn al la konstanta adreso de la Kongreso (en Rotterdam). Ilustritajn turismajn prospektojn pri Hamburgo (en Esperanto) oni povas peti ĉe la Urba Turisma Oficejo: Fremdenverkehrs-zentrale Hamburg E.V., D-2 Hamburg 1, Bieberhaus.

La gazetaro atentigas la Kongreson

La influhava ĵurnalo *Die Welt* (eldonkvanto 263 400) aperigis en la numero de la 12a de februaro 1974 ampleksan artikolon pri la 59a UK. Jam pli frue komencis aperadi informoj kaj artikoloj en hamburgaj kaj aliaj germanaj gazetoj. La pozitive akcentita artikolo en *Die Welt* interalie priskribas la batalon kontraŭ lingva diskriminacio, kiun kondukas la Esperanto-movado kaj emfazas la temon de la Kongreso, "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo".

Ankoraŭ eblas ĝui malpli altan aliĝtarifon

Denove proksimiĝas limdato por la tarifo de la kongreskotizoj. Post la 31a de marto 1974, ĉiuj kotizoj altiĝos je ĉ.10 procentoj. La sama limdato validas ankaŭ por tiuj, kiuj pro devizaj aŭ pasportaj kaŭzoj povas pagi la aliĝkotizon nur post la alveno en Hamburgo. Por ĝui la tarifon de la unua aliĝperiodo, ili

devas ĝis la fino de marto skribi anonci sian intencon partopreni la Kongreson. Tio en la praktiko signifas, ke tiaj personoj plenigas la aliĝilon kaj sendas ĝin al la konstanta adreso en Rotterdam, sed oni nur provizore notas tiajn "aliĝojn" kaj definitive traktas ilin nur post la alveno de la koncerna persono, do dum la Kongreso mem.

Frue mendi komunan loĝejon

LKK atentigas tiujn, kiuj preferas loĝi en komuna (kaj malpli kosta) loĝejo, ke tion necesas frue mendi. Mendilo estas jam nun ricevebla ĉe la komisiitino de LKK, f-ino Hella Lanka, César-Klein-Ring 14, D-2 Hamburg 71, FRG. Plenaj detaloj pri loĝado aperas en la dua Oficiala Bulteno.

Komuna kongreso de KELI kaj IKUE

La Tria Internacia Kongreso de Kristanaj Esperantistoj (la 35a de IKUE, la 26a de KELI) okazos en Jungendpark, Hamburg-Langenhorn, FR Germanujo, de la 20a ĝis la 27a de julio 1974, t.e. tuj antaŭ la Universala Kongreso. Por informoj kaj aliĝoj oni turnu sin al: s-ro F. Galbusera, Vicolo Ghiacciaia 6, I-37100 Verona, Italujo, aŭ al f-ino Tini Putto, Weerdestein 43, Ede-6100, Nederlando. Aliĝoj estas petataj antaŭ la 15a de aprilo 1974.

Por kontentigi ĉies intereson

La pluraj dekoj da fakaj kaj specialaj kunvenoj, jam anoncitaj por la 59a UK, ampleksas vastan gamon da temoj, en kiuj ĉiu kongresano certe trovos ankaŭ proprajn interesojn. Apud la regulaj kunvenoj de fakaj kaj aliaj organizaĵoj kunlaborantaj kun UEA, en la programo troviĝas ankaŭ multaj kunsidoj de aliaj instancoj kaj malpli konataj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ la 27a sesio de la Internacia Somera Universitato (ISU) promesas riĉan programon, ĉar jam alvenis prelegproponoj de 18 profesoroj el 12 landoj. La definitivan programon de la ĉi-jara ISU faros la Estraro de UEA en sia kunsido komence de aprilo.

"Tra pitoreska Nederlando"

Por la turisma alvojaĝo al Hamburgo, organizata sub tiu titolo de f-ino M.H. Vermaas (Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam 3002, Nederlando), la limdato por aliĝoj estas ŝovita al la 15a de aprilo 1974, i.a. pro la poŝtaj strikoj en kelkaj landoj.

Jam preskaŭ mil kongresanoj

Laŭ la lastaj informoj, ĝis la 20a de februaro 1974, al la 59a UK jam aliĝis 965 gekongresanoj el 42 landoj.

40 gastigantoj

POST PLURJARAJ PROVOJ doni ĝustan organizon formon kaj en la grundo de la realeco kreskigi radiokojn al la Pasporta Servo de TEJO, ĝia nova gvidanto, la kasistino de TEJO Jeanne-Marie Cash, ŝajnas esti trovinta la solvon. Kvankam la ideo estas relative malnova (lanĉita de d-ro Rubén Feldman-González sub la nomo "Programo Pasporto" en 1966), ĝia plena ekfunkcio promesas realiĝi nur ĉi-jare kaj en la jaroj kiuj sekvas. Ĝus aperis la "unua modesta broŝureto", kiel ĝin priskribas la prizorgantino de la Servo, sed kiu, eĉ se ĝi estas modesta, meritas fanfaronan alrilaton, tiel pri la aspekto kiel pri la enhavo.

La broŝuro aŭ pli ĝuste la Pasporta Servo de TEJO celas ebligi, ke junaj homoj uzu la Internacian Lingvon ankaŭ por sia propra plezuro kaj kultura pliriĉiĝo, preventante tiamaniere, ke la vojaĝantaj gejunuloj pro manko de rekta utiligo rapide rezignu pri Esperanto kaj transiru al la angla aŭ alia lingvo. La Servo estas ankaŭ solvo por tiuj vojaĝemaj kaj gastigemaj gejunuloj, al kiuj iliaj financoj ne permesas praktiki la klasikan turismon. Plie, al tiuj kiuj al la mondo deziras pruvi la efikecon de la Internacia Lingvo, la Servo portas novan argumenton, kiu povas esti pli konvinka ol tuta monto da deklaroj.

En la 16-paĝa broŝuro de la Pasporta Servo troviĝas kvardeko da adresoj en 19 landoj de 5 kontinentoj. La fakto, ke apud la adreso de ĉiu gastiganto troviĝas tre klaraj indikoj pri la dezirataj vizitontoj, aludas la seriozecon de la tuta aranĝo, kiu jes estas destinita ĉefe al la junularo, sed al ĝi povas aliĝi ankaŭ pli aĝaj geesperantistoj. La broŝuron oni povas akiri kontraŭ aliĝkotizo al la Servo: 5 francaj frankoj aŭ egalvaloro (aŭ 6 internaciaj respondkuponoj), kion oni sendu al: Jeanne-Marie Cash, 72 Rue des Rennes, F-75006 Paris, Francujo; poŝta ĝirkonto 21 572 83 Paris.

Defio por demostenoj

LA TEMOJN de la ĉi-jara Oratora Konkurso en Hamburgo ni jam anoncis en la januara numero de la revuo (p. 15). Tiujn temojn proponis la teknika kunsido de la Estraro de UEA, okazinta komence de decembro 1973, kaj ili estas jene formulitaj: 1) Naciismo kaj internaciismo en mia lando, 2) Ĉu internaciaj sportaj konkursoj kontribuas al internacia

amikeco aŭ incitas naciismon? 3) Kion volas la junularo en la Esperanto-movado? 4) Perforto en literaturo kaj sur ekranoj. Laŭ propono de la prezidanto de TEJO, al tiuj kvar temoj aldoniĝas du pliaj: 5) Internaciigo de la edukado, kaj 6) Internacia kunlaboro de la junularo.

Kiel facile konstateblas, la temaro de la ĉi-jara Konkurso bele ligiĝas ne nur al la ĉeftemo de la Hamburga Kongreso (per la unuaj du temoj), sed ankaŭ al la ĉefa diskuttemo de la 30a Internacia Junulara Konferenco en Münster (per la kvina temo). Sed tamen, eble la ĉefa defio al novaj demostenoj estas la titolo de la tria temo, des pli, ke ĝi formulas demandon, kiu dum la lastaj jaroj ofte aŭdiĝas en la Movado. La medio de la Universalaj Kongresoj estas plej konvena por kompetente trakti la demandon "Kion volas la junularo en la Esperanto-movado?". Oni jam dum jaroj oratore kaj neoratore traktis tiun temon en diversaj junularaj kunvenoj, seminarioj, kongresoj kaj konferencoj, — tempo sufiĉe longa por pretigo de publika elpaŝo, al kiu invitas la tria temo de la Oratora Konkurso en Hamburgo.

Laŭ la regularo pri la Oratora Konkurso, rajtas partopreni gejunuloj ĝis inkluzive 28-jaraj, kiuj aliĝas al la Kongreso kaj partoprenas ĝin. Ankaŭ ĉi-jare la plej sukcesajn partoprenontojn de la Konkurso atendas monpremioj de 100, 70 kaj 40 ned. guldenoj. Skribajn sinanoncojn por la partopreno en la Konkurso oni prezentas dum la Kongreso ĉe la ĝiĉeto "Informejo".



EN MÜNSTER ONI FARAS RADIKALAJN PREPAROJN POR LA 30-A IJK: Antaŭ la estonta konferenco (finkonstruota en aprilo) LKK-anoj pridiskutas lastajn ŝanĝojn de la konstruplano (aŭ IJK-programo?).

Bulgarujo

• En la marborda urbo Burgas, inter la 5a kaj 24a de aŭgusto 1974, okazos internaciaj Esperanto-kursoj por instruistoj, kiujn gvidos prof. d-ro I. Szerdahelyi kaj A. Pettyn. Samtempe kun ĉi tiu aranĝo, kiun aŭspicias ILEI, okazos (11a – 24a de aŭgusto) ankaŭ seminario por E-pedagogoj.

Kolombio

• Lige al nova Esperanto-kurso ĉe Universidad Pontificia Bolivariana en Medellín, la estro de la lingvistika fako de la Universitato, s-ro Manuel Angel, havis 12-minutan intervjuon en la plej grava radio-stacio de la lando. Al la kurso, kiu komenciĝis meze de februaro, aliĝis pli ol cent gestudentoj.

Ĉinujo

• Unu el la plej regule aperantaj periodaĵoj en la Internacia Lingvo, *El Popola Ĉinio*, en siaj unuaj numeroj por 1974, reaperigis kelkajn rubrikojn, kiuj forestis el la revuo dum pluraj jaroj. Temas pri la rubrikoj: “Ĉinaj naciecoj”, “Historiaj rakontoj”, “Ĉina geografio”, “Respondoj al legantoj” kaj “Esperantaj novaĵoj”. Krome, en reklamcirkulero de la Libroservo de ĈEL aperas kelkaj ne-politikaj E-eldonaĵoj, pri kiuj oni kredis, ke ili jam delonge elĉerpiĝis. Tio ĉi sugestas, ke oni povus atendi reaktiviĝon de la Fremdlingva Eldonejo ankaŭ sur la kampo de beletro.

FR Germanujo

• La 6an de februaro, en Kolonjo okazis granda protestkunveno de 12 000 instruistoj. Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj eluzis la okazon por distribui ĉ. 50 000 varb-poŝtkartojn.

• “Tezoj por la germana lingvo-politiko” de prof. d-ro H. Frank (v. la februaran numeron, p. 27) aperis en la konata scienca revuo *ibw-journal*. Klopodante diskonigi la enhavon de ĉi tiu studo, la germana ILEI-sekcio preparis ankaŭ E-tradukon, kiu estas mendebla (kun la germanlingva originalo kontraŭ 4 rpk) ĉe H. Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne 1.

Sovet-Unio

• “Radieto”, junulara E-klubo en Riga (Latvujo) organizas novan poezian konkurson. Limdato estas la 31a de majo 1974, antaŭ kiu oni sendu siajn konkursaĵojn al: A. Medins, Ed. Smilga 34-5, Riga 2, Sovet-Unio. Kvankam la konkurson organizas junulara klubo, oni eksplicite emfazas, ke estas bonvena partopreno ankaŭ de pli aĝaj poetoj.

Fake

Edukado

• Fine de januaro en Alĝerio okazis kongreso de arabaj sciencistoj, kiu okupiĝis pri “arabigo de la edukado” en la arabaj landoj. Kvankam la kongreso ĉefe traktis la terminologiajn demandojn kaj ĝeneralan adapton de la araba lingvo al la postuloj de la modernaj sciencoj, ĝi emfazis ankaŭ la neceson de metodikaj modernigoj en la edukado. La nuna kongreso daŭrigis laboron komencitan dum la unua tiaspeca renkontiĝo en Maroko, en 1961.

Eldonejoj

• Laŭ pritrakto de *El Popola Ĉinio*, de 1959 ĝis 1973, Fremdlingva Eldonejo en Hanojo eldonis pli ol 60 librojn en la Internacia Lingvo, kiuj ampleksas proksimume 9 000 paĝojn. La eldonejo nun komencas ambician planon, kies celo estas eldoni plurvoluman antologion de la vjetnama literaturo.







Persono

Divjanović

• La patro de la popularscienca revuo *Homo kaj kosmo* kaj de la esperantista kampadejo en Primošten (Jugoslavio), d-ro Gabriel Divjanović, direktoro de la Astronomia observatorio en Zagreb, meze de decembro 1973 troviĝis inter kvin elstaraj jugoslavaj sciencistoj al kiuj la ĝenerala konsulo de Pollando transdonis Medalon de Kopernik. D-ro Divjanović estas esperantisto jam 40 jarojn. Li

Komunikado

• La novjorka hospitalo Bellevue, kiu malfermiĝis fine de 1973 kaj kostis ĉ. 100 milionoj da dolaroj, klopodas solvi siajn lingvo-problemojn per tuta aro da signoj, “kompreneblaj por ĉiu”. Por ilustru tiun “kompreneblecon” ni prunteprenis



ĉi tiujn ses specimenojn, kiuj devus signifi: apoteko, hidroterapio, oftalmologio, fizika terapio, dentisto, labor-terapio.

Stenografio

• Ŝtata pedagogia eldonejo, en Prago, publikigis ĉefan libron *Historio de stenografio* de prof. Jan Petrásek, en kiu plurfoje estas menciita Esperanto kaj la utilo kiun ĝi donis al ĉefaj stenografoj, en iliaj internaciaj profesiaj kontaktoj.

iniciatis la feriejon en Primošten kaj redaktas *Homo kaj Kosmo*-n.

Pettyn

• La ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio, Andrzej Pettyn, havas reputacion de elstara aŭtoro de lernolibroj por la Internacia Lingvo. Nur en la jaro 1973, lernolibroj, legolibro kaj informaj broŝuroj de A. Pettyn aperis en eldonkvanto de preskaŭ 50 000 ekzempleroj.

N-ro 476, 1974 - 02 - 15

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

BRAZ: A. Rocha. BRIT: S-ino M. Davies, S-ino A.C.E. Childs-Mee, D.J.F. Quirke. DAN: S.F. Jørgensen. FRA: Albert Cnudde. FRG: Willi Berger, R. Scharfenberger. KAN: F-ino L. Labelle. NED: F-ino I. Chundro, F-ino F.B. Rauwerdink, S-ino M.G. Schoutens-v. Lammeren. NOV-ZEL: James T. Allan, E.R. Dearnley, M.C. Leon, David Mac-Gill, S-ino M. Gibson. SVIS: A. Cotton. USONO: H. Baksik, S-ino N.J. Campbell, F-ino Jullie L. Regal, W.B. Schwartz.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1974

BRAZ: S-ino Maria P. Almada, F. S. Almada, Nid D. Amarin, Benedito F. Farias, Paulo O. Ludka, Oscar S. Mello, José D. Pinto, Deoclécio L. Verde. BRIT: G.B. Atkinson, F-ino M.J. Hockey, D. Kennedy. DAN: J. Bjerg-Nielsen, M.G. De Maal. FIN: Harri Tuomola. FRG: J. Grundhoff. ITA: F-ino P. Nicola, A. Viotto. JUG: S. Crnić. KAN: F-ino M.A. Clark. NED: G.M.J.B. Peet. NOR: P. Engen. NOV-ZEL: R.J. Clarkson, V.I. Curry, G.D. Dewar, W.D. Harding, V.R. Moore, A.G. Wiltshire. SVED: F-ino M. Ahlström, H. Almén, Ivan Andersson, S-ino M. Colliander, Einar Dahl, Henrik Karlsson, Ville Lidell, F-ino E. Lind, Torsten Lindberg, F. Nord-

berg, I. Nordin, S. Szabad, L. Tell. SVIS: H. Boffejon. USONO: F.J. Belinfante, Sidney S. Culbert, S-ino Ruth M. Evans, D.R. Evans, Vasco R. Geer Jr, W.W. Glenney, W.C. Nelson, J. Parkerson, G. Rodenborn, Weston Williams.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1974-05-10 neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

FRA: Albert Cnudde, FD Grenoble kaj Meylan. FRG: M.P. Zeilinger, FD Fürth; Martin Petermann, FD Neustadt/Weinstrasse; J. Windisch, D Nürtingen. JAP: Kei Kurisu, D kaj FD Hino. SVED: Eric Fredin, D Lomma. USO: Stefano Teeple, VD kaj JD Austin; Daniel Mason, FD Berkeley; Fratino Philippa Margaret S.C., D kaj FD Las Vegas; Thomas G. Ludwig, D Lexington; Stuart E. Kittredge, FD Newington; W. Campbell Nelson, D Ontario; Lee Edwards, VD San Diego; S-ino Eleanor B. Stein, FD San Diego;

Simon Mudry, FD Santa Barbara; Vincent A. Griffeth, FD Seattle; Alvin L. Ziegenhagen, D Stevens Point; S-ino Louisa Schmidt, D kaj FD Tucson.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri jenaj delegitoj en Jarlibro 1973, Unua Parto.

FRA: Aix-en-Provence, VD kaj FD (lingvoj); Meylan, FD. FR GERM: Fürth, FD. HISP: Icod. KOREUJO: Taegu, FD (edukado). NED: Alblas-serdam. NOV-ZEL: Auckland, VD. SUD-AFR: Durban. SVED: Lomma; Stockholm, VD Jack Snarberg kaj FD (horloĝoj/juvelaĵoj); Sundsvall JD; Varberg. USONO: Covington; New York, JD; Poy Sippi.

KOTIZOJ POR NORVEGUJO: KOREKTO

Pro malfeliĉa preteraro aperis en la Jarlibro 1973, Dua Parto, malĝusta tarifo de UEA-kotizoj en kronoj norvegaj. La ĝusta tarifo jam aperis en *Esperanto*, 1973, septembro, p. 159, nome tiu bazita sur MA = 80 kronoj. Ni afable petas la norvegajn membrojn tion atenti.

Membro-statistiko 1973

La ĉi-suba tabelo montras la finan nombron de membroj en ĉiu kategorio por la kotiza jaro 1973. Por komparo aperas en la maldekstra kolumno ankaŭ la ciferoj pri 1972.

	1972	1973
MJ	727	734
MA	4 837	4 860
MS	274	301
DM	876*	945
HM, H. Prez.	18	18
J-MJ	40	37
J-MA	159	187
MA-K	110	149
Individuaj membroj	7 041	7 231
Asociaj membroj*	25 591	22 379
Membroj entute	32 632	29 610
Simplaj abonoj	141	165
Pagintoj entute	32 773	29 775

* Sumo korektita post la pasintjara statistiko.

* La sumo de asociaj membroj por 1973 ankoraŭ ne estas definitiva,



ĉar en la momento de redakto pluraj pagoj de la aliĝintaj landaj asocioj restas atendataj. Tre verŝajne la fina nombro de asociaj membroj, same kiel tiu de la individuaj membroj, montros plialtiĝon.

* * *

Plej multe da individuaj membroj havas Francujo (635) kaj Usono (621); en la nobla kategorio de la membroj-subtenantoj, ĉampionas Svedujo (74) kaj sekvas denove Usono (45); en la kategorio de la dumvivaj membroj, la unuan lokon okupas Nederlando (113) kaj sekvas unu plian fojon Usono (103); plej multe da asociaj membroj estas en Bulgarujo (5 100), Hungarujo kaj Pollando (po 3 100).

**TIU ĈI NUMERO
ESTAS LA LASTA,
KIUN VI RICEVAS,
SE VI ANKORAŬ
NE PAGIS
POR LA ABONO
EN 1974.**

La abontarifo aperas
sur la dua kovrila
paĝo de ĉi tiu revuo.



Esperanto en radio

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, F-75016 Paris, Francujo. Por aliaj detaloj vidu la januaran numeron.

RADIO ZAGREB informas, ke ĝiaj elsendoj por esperantistoj ekde la 8a de marto 1974 okazos vendrede (ne plu ĵaŭde) je la 23.05 laŭ la Greniĉa tempo, resp: je la 00.05 laŭ MET. Ondolongo restas la sama: 264 m.

ĈINA RADIO. Laŭ laste ricevataj informoj el Pekino, la elsendoj speciale direktitaj al Eŭropo, estas dissendataj vendrede kaj sabate de la 20.00 h ĝis 20.30 h per ondoj 43 m, 33 m, 31 m; tiuj direktitaj al Japanujo kaj Koreujo, de 11.00 h ĝis 11.30 h per ondoj 47 m, 40 m; tiuj direktitaj al la sudorienta Azio, de 12.30 h ĝis 13.00 h per ondoj 30 m, 25 m. Do, nur kelkaj ondlongoj ŝanĝiĝis, sed ne estas eble ricevi pli precizan informon pri ili. Raporton pri aŭskultado oni sendu al Radio Pekino, Esperanto-fako, Pekino, Pop. Resp. Ĉinujo.

RADIO ROMA. La programo estas nun dissendata per ondoj 50.08 m (5990 kcs), 41.24 m (7275 kcs), 30.90 m (9710 kcs); samaj tago kaj horo, tio estas ĉiudimanĉe de 20.00 ĝis 20.20 GMT. La elsendoj temas pri "Novaĵoj el Italujo" (informoj pri la itala vivo, komentoj pri internaciaj eventoj en rilato kun Italujo), "Leterkesto" (korespondado kun aŭskultantoj), "Kuriero de Esperanto" (informoj pri la Esperanto-movado kaj ĝenerale pri lingvaj problemoj). Redaktoro: d-ro Antonio De Salvo; kunlaborantoj: f-ino Mirella Merlani kaj d-ino Vera di Tocco. Informoj, kontribuaĵoj, sugestoj, raportoj pri aŭdebleco estas dezirataj: Radio Roma, Esperanto-fako, Casella Postale 320, I-00100 Roma, Italujo.

RADIO VALENCIA. La hispana stacio "La Voz de Levante" nun prezentas sian programon sabate de 22.00 ĝis 22.15 GMT. Sama ondlongo: 358 m (836 kcs).

RADIO WIEN. La 4an de pasinta novembro komenciĝis nova programo, dissendata per mallongaj ondoj; ĝi okazas ĉiun sabaton de 16.45 ĝis 16.55 GMT per ondoj 48.74 m (6155

kcs) por Eŭropo, 16,87 m (17780 kcs) por Aŭstralazio kaj la sudorienta Azio, kaj estas ripetata la sekvan-tan dimanĉon de 5.45 ĝis 5.55 GMT per ondoj 48.74 m (6155 kcs) por Eŭropo, 41.38 m (7250 kcs) por la sudorienta Eŭropo, 23.61 m (12705 kcs) por Aŭstralazio kaj la sudorienta Azio. La programon prizorgas la Radio-servo de Aŭstria Esperantista Federacio kaj parolas alterne d-ro Karl Beckmann kaj s-ro Emil Vokal. La unuaj kvin minutoj estas dediĉitaj al raportoj pri Aŭstrujo, la aliaj kvin minutoj al novaĵoj, elektataj de la aŭstra mallongonda stacio mem. La ĝisnuna mezlongonda dissendo, ĉiun kvaran merkredon, daŭras. Bv. sendi aŭskultraportojn al Oesterreichischer Kurzwellendienst, Argentinierstrasse 30a, A-1040 Wien.

POLA RADIO. Novaj interesaj konkursoj estas organizitaj, unu de Pola Radio, la alia, por infanoj, de Kulturdomo en Bydgoszcz. En ambaŭ konkursoj estas antaŭviditaj multnombraj premioj, inter kiuj, vojaĝoj al Pollando. Petu precizajn informojn de Pola Radio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando. (Vidu apartan anoncon en ĉi tiu numero de la revuo).

Nekrologoj

Ernesto Sonnenfeld

La 27an de januaro 1974 mortis en Urugvajo unu el la plej elstaraj figuroj de la Movado en Sud-Ameriko, akademiano Ernesto Sonnenfeld. Li naskiĝis en 1905 kiel germanlingvano en Uherský Ostroh en Moravujo (tiam aŭstro-hungara regno, nun Ĉeĥoslovakujo). Post gimnazia lernado en Hungarujo kaj Aŭstrujo, li licenciĝis pri ekonomio en Vieno. En 1918 li fariĝis ĉeĥa civitano kaj loĝis en Brno de 1927 ĝis 1938. De tiam li loĝis en Buenos Aires, sed nur en 1951 fariĝis argentina civita-

no. Fine, pensiita post komerca kariero, li translokiĝis al Montevideo. Sonnenfeld lernis Esperanton en 1922, akiris diplomon de la Aŭstra Ŝtata Ekzamenkomisiono pri instru-kapablo de Esperanto en mezlernejoj kaj gvidis plurajn kursojn en Vieno. Kun sia instruisto d-ro Emil Pfeffer li redaktis la revuon *Die Weltsprache*, diversajn E-lernilojn kaj Kongresan Bultenon de 1924. Krome, li kunlaboris en *Danubio*. Ankaŭ en Montevideo li aktivis kiel instruisto de Esperanto en la Instituto de Superaj



Studoj, ligita al la Universitato de Montevideo. Li estis membro de la Akademio de 1968. Estinte dum pluraj jardekoj membro de UEA

(depost 1951 dumviva membro), li funkciis kiel peranto kaj fakdelegito pri esperantologio. Li eniris la estraron de Urugvaja Esperanto-Societo en 1963 kaj la postan jaron estis elektita ĝia prezidanto. Krom regula kontribuado al *Boletín Uruguayo de Esperanto*, Sonnenfeld kunlaboris ankaŭ en la revuo *Esperanto*, *Heroldo* k.a. periodaĵoj. Li kontribuis al *La Zamenhofa Esperanto* kaj tradukis la eposon *Martín Fierro*, kiu aperis en la Serio Oriento-Okcidento en 1964. En 1970 aperis lia traduko el la hispana de *Tra lando de indianoj* de Tibor Sekelj.

C. TIMMERMAN (1908-1974)

En Durban (Sud-Afriko) mortis la tiea delegito de UEA Cornelis J. Timmerman, kiu tien elmigris antaŭ multaj jaroj el sia patrujo Nederlando. S-ro Timmerman estis ankaŭ tre aktiva membro de Sud-Afrika E-Asocio.



PIERRE BOULOGNE (1890-1974)

En Aix-en-Provence (Francujo), la 2an de januaro 1974 forpasis unu el la pioniroj de la Movado, Pierre Boulogne, lerninta la Internacian Lingvon en la jaro 1907. Dum mul-


taj jaroj li estis prezidanto de la loka grupo, gvidis amason da kursoj kaj organizis regionan kongreson en Aix-en-Provence. Ĝis sia morto li funkciis kiel vicdelegito en la urbo.

GEORG PODLINSKI (1892-1974)

La 4an de januaro 1974, en Gronau (FR Germanujo) forpasis Georg Podlinski, dum pluraj jardekoj aktiva membro kaj delegito de UEA kaj aktivulo de GEA, kies meritmedalon li ricevis okaze de sia 80-jariĝo. S-ro Podlinski ĉiam aparte interesiĝis pri la aktiveco de la esperantista junularo, kiu per lia morto perdas entuziasman apoganton.

KOREKTO

En la februara numero de la revuo (p. 24), estas erare indikita la 28a de januaro kiel la tago de la forpaso de Luigi Minnaja. La ĝusta dato de la forpaso estas la 27a de januaro 1974.



Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,50 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Multaj lernantoj divers-landaj, kiuj ne povas pagi ekster-landen, deziras ricevi la novan kaj alloge prezentitan lego-libron **AMUZAJ DIALOGOJ EN ESPERANTO** por facile lerni paroli la Internacian Lingvon. Se vi volas helpi al ni plenumi tiun deziro, bonvolu sendi mono-donacon por la Propaganda Konto, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002. Poŝta ĉek-konto: 37 89 64.

Filatelistoj! Nuntempe mendeblaj ĉe UEA estas paketoj da poŝtmarkoj en kvantoj de 25 ĝis 5000 diferencaj, pakitaj laŭlande aŭ laŭteme (ekz. floroj, aeronaŭtiko k.s.). Petu prezliston ĉe la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam - 3002, Nederlando.

Rumanujo,
Suĉeava 6,
P.O. Box 502,
s-ro Mihail
Petre
Dunĝeanu,
42j., dez.
kontakti t.m.
kun abel-



bredistoj. Li ankaŭ ofertas korespond-adresojn en Rumanujo.

Sporto en la mondo, grava ekspozicio en aprilo. Sendu koncernaĵojn al: Liceo Chevrolier, Esperanto-Rondo. F-49000 Angers, Francujo.

Ĉu vi serĉas malnovan terminaron? elĉerpitan beletraĵon? praverkon el la 19a jarcento? mankantan jarkolekton de malnova revuo? Demandu ĉe la Fotokopia Servo de UEA, kiu povas havigi al vi unuarangajn kserografiajn kopiojn el la Biblioteko Hodler. Prezo de unu kopio (= du paĝoj de mezformata libro): 0,30 gld. Sendokostoj 10%. Petante oferton, indiku klare la titolon kaj, laŭeble, la eldonjaron.

Letervesperon aranĝas nova E-Klubo, fine de aprilo. Kuraĝigu gekomencantojn sendante bele afrankitajn bildkartojn al: Esperanto-Klubo, Maison des Jeunes, F-14360 Trouville sur Mer, Francujo.

Memoru, ke s-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK-2700 København, daŭre akceptas ĉiaspecajn poŝtmarkojn por UEA. Ni petas vin konservi viajn uzitajn poŝtmarkojn kaj sendi ilin al la supra adreso. Tiel vi povas kontribui al financa fortikigo de UEA.

Edziĝcele dez. korespondi (Esperanto, angla, germana) 35-jara flugkompania oficisto Mehmet Telyakar, Aydınlık sok no. 23, Ortaköy, Istanbul, Turkujo.



Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Se vin interesas penso pri vendado aŭ/kaj aĉetado de varoj inter diversaj landoj per Esperanto, bv. skribi al Seppo Jurvanen, Huovin teoll. alue, SF-33960 Pirkkala 6, Finnlando.

S-ro Louis de Gonzague anoncas la ŝanĝon de sia nomo kaj adreso: Ngingi Malonga Matuba, 188 Rue M'Siri, Bandalungwa, Kinshasa, Respubliko Zairo.

OFERTO!

KVIN CENT (500!)

malsamaj poŝtmarkoj de Usono.

Ĉiuj estas grandformataj memorigaj


bildmarkoj. Prezo: 80 gld. Ĉi tiu stoko estas limigita.

Pliaj ofertoj: - 400 malsamaj: 60 gld. 300 malsamaj:

40 gld. 200 malsamaj: 25 gld. Ĉiuj en bona stato.

La prezoj inkluzivas la sendokostojn kaj imposton

nederlandan. Mendu ĉe UEA. Rapidu! Ne maltrafu ĉi tiun specialan oferton!



Copernicus

1473 - 1973



8c US



U.S. POSTAL SERVICE 8c

Lyndon B. Johnson

United States

8 cents



HELPU REKLAMI



LA 59-AN

Universalan Kongreson

en Hamburgo,

uzante sur viaj

korespondaĵoj la

allogan dukoloran

glumarkon!

Folio po 10 markoj

kostas 0,55 gld,

afrankite (por Neder-


lando: 0,60 gld afr).

Mendu ĉe UEA

ĈU VI JAM HAVIS KONTAKTOJN KUN

ĈU VI
AŬDIS,
KE ĜI
ESTAS
IO TUTE
ALIA?

CETERE,
ĈU INDAS
SIMPLE
KREDI
AL ALIAJ?



ĈU VERE NE EBLUS PROVI MEM ĈU
ĜI MERITAS LA FAMON ĜUATAN?

Abono: NUR 11 gld. (por Nederl. 11,44).

Ĝi preskaŭ neniam aperas ĝustatempe, sed
ĝia enhavo estas ĈIAM aktuala kaj freŝa!

Eldonas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo,
Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

L. Mimó

'Kompleta lernolibro de regula Esperanto'

Analiza skolo

Paĝoj 189. Prezo 17,50 guldenoj.
Eldonis la aŭtoro, str. J. Comas 19,
Sabadell, Hispanujo.

"... detala, tre serioza studo de la tuta
lingvo, komparebla al la *Plena gramatiko*,
sed vi ja rigardas la tuton el tute alia
flanko, kio faras vian verkon aparte grava."


D-ro C. Støp-Bowitz, Akademiano

Helsingör 1974

tuj antaŭ UK de Hamburgo

La internaciaj feriaj Esperanto-kursoj okazos 21. —
27. de julio en La internacia Altlernejo de Helsingør.
Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn
tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ
la Kongreso de Hamburgo. Karavanvojaĝo el
Helsingør al Hamburgo, kaj reen, estos aranĝita per
trajno speciala por la kursanoj. Programo senpage
havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Åbyhøj, Danlando



LA TORNISTRO

-bona distro -
Jam aperis N° 1
kaj N° 2 kun tre
varia enhavo:
artikoloj,
rakontoj,
spritaĵoj,
recenzoj,
poemoj, ktp.
kun multaj
ilustraĵoj.
52 paĝoj.
22 cm.
Prezo: po 5 gld.
Mendu ilin ĉe
UEA, kaj ankaŭ
la jenajn verkojn

eldonitajn de Argentina Esperanto-Instituto:
KALEJDOSKOPA VARIETEO (prozo kaj
poezio) de Ergoto de Bonaero, 160p. 17cm.
Prezo: 9 gld.

JUNULEJO (Rememoroj de gimnaziano), kaj **LA
BUĈEJO** (novelo) 128p. 17cm. Prezo: 9,54 gld.


NIAJ PLEJ GRANDAJ VERKISTOJ (de Eo),
kaj **EKFLORADO ĈE PLATA RIVERO** (Pri la
Eo-movado) 112 p. 17 cm. Prezo: 7,50 gld.

LA KRIMO DE L'MILITO 212 p. 15 cm.
Prezo: 12,75 gld.

La legolibro, kiun ni plej bezonis



Novspeca
legolibro en-
havanta 20
dialogojn kun
2000 konversa-
ciaj frazoj, parol-
turnoj, demandoj
kaj respondoj kaj
kun 20 tutpaĝaj
humuraj ilustraĵoj.
La tekstoj estas laŭ-
grade aranĝitaj.



Verkita en
simpla stilo
por faciligi al
novaj lern-
antoj paroli
la Inter-
nacion
Lingvon

141 pj.
Poŝform-
ata (22 x
12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis:
Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.

Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus
sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe
mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

**POLA RADIO
VARSOVIO**

10-taga ekskurso tra Pollando

MULTAJ PREMIOJ KAJ MEMORDONACOJ

— en enketo de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj geaŭskultantoj.

Al partopreno en lotado de la premioj rajtigas respondo al almenaŭ unu el la jenaj demandoj:

1. *Kiujn internaciajn iniciatojn de Pollando vi opinias speciale gravaj kaj kial?*
2. *Kiuj problemoj estantaj objekto de la debatoj de la Konferenco pri la eŭropaj sekureco kaj kunlaboro plej multe interesas vin?*
3. *Kiuj elsendoj de la Pola Radio en la periodo januaro-februaro 1974 — laŭ via opinio — plej interese prezentis la bildon de la nuntempa Pollando?*

La respondojn ni petas sendi al la adreso: Pola Radio, 00-950 Warszawa, P.O.Box 46, Pollando, en
kovertoj signitaj per la devizo "Konkurso", ĝis la 15a de marto 1974 (decidas la dato de la poŝta
stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en niaj disaŭdigoj la 16-an de aprilo 1974.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Radio Varsovio ĉiutage disaŭdigas en la Internacia Lingvo du programojn: 06.00 h. (ondolongoj:
41 m, 49 m, 200 m); 16.30 h. (ondolongoj 31 m, 41 m). Horoj laŭ la mezeŭropa tempo.